

1978 marto

71-a jaro

n-ro 867 (3)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — nl-3015 bj rotterdam — nederlando



Spacesploroj:
Konkursa ludo aŭ vivbezono? p.50

Vi trovos

amason da paĝoj en ĉi tiu numero. La pligrandigita amplekso plivariigis la enhavon. Ĉu estis novembro pasintjare, kiam ni ĉi-loke promesis al vi surprizon en 1978? Nu, jen la surprizo! Tamen, ne eksaltu pro pensoj, ke ekde tiu ĉi numero la revuo ĉiumonate venados al vi sur 32 paĝoj. Tiom da mono UEA ne havas. Kial do tiam ĉi tiu 32-paĝa numero? Por tikli vian scivolon, por sondi vian intereson pri, ekzemple, scienca rubriko, kiun vi trovos sur la paĝoj 50 ĝis 54, por montri al vi, kiel povus esti, se ĉiu dua leganto varbus plian abonanton, se ĉiu mila ricevanto de ĉi tiu revuo trovus kaj kontraktus duon-paĝan komercan anoncon. Ĉu sufiĉe da kialoj kaj klarigoj? Ĉu sufiĉe da ideoj por transformiĝi de pasiva leganto en aktivan apoganton?

Iu foje — mi ne volas memori — atentigis, ke li ne ŝatas ĉi tiun rubrikon, ĉar la tekstoj en ĝi ofte estas subjektivaj, tro personaj, barometro kvazaŭa de la redaktora humoro. Konsentite. Ne legu do ĉi tiujn liniojn, se vi opinias same aŭ simile. La rubriko ja restos iom persona, por atentigi vin, ke ĉi tiu revuon ne redaktas komputilo. Jen la ĉi-foja subjektivaĵo: Du seke verkitaj nekrolo- goj (p.63), tiuj pri Branko Rajšić kaj Madeleine Haudebine, skuis la redakto- ron, ĉar li estis lernanto de la unua kaj disĉiplo de la dua. Li do tristas kaj funebras, sed tio ne malhelpu vin ĝui la paĝriĉon kaj temabundon de la nume- ro. Ne diru "dankon" pro la nuna revuamplekso. Agu danke! Ĝis aprilo!

Enhavo

- 41 Beograda Konferenco: Ludo kaj kostoj (S. Milojević)
- 42 Informado: Favora klimato
- 43 Radio-programoj en Esperanto: Jubilea meditado (Emilija Lapenna), Lisbono, Moskvo
- 44 Anstataŭ recenzo pri la lasta libro de E. Wüster: La alia flanko de la medalo (R. Vetter)
- 46 Libromerkato: Kiel fartas libroj? (sm), Belartaj Konkursoj (anonco)
- 48 Faka agado: Al matematika terminaro (F. Lo Jacomo), Landa agado: Surprizoj el Kubo
- 49 La lingvo: Pri "fotografo" (Bernard Golden), Japana fondaĵo (U.L.)
- 50 Scienco: Industriigo de la kosma spaco (Wim Jansen)
- 55 Recenzoj ("Al vi de mi", "Tra l' mondo", "Trigroŝa romano", "Grete kaj Jep", "Latva fabelareto", "Malgrandaj plantidgardantoj", "Saĝa kapto de granda huzo", "Faktoj kaj teorioj kontraŭ mitoj kaj antaŭ- juĝoj — Esperanto aŭ Interlingua?")
- 57 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 58 Leterkesto (Pirlot, Najbaro, Frangeul, Sterke, Sekelj, Gruić)
- 59 TEJO-paĝo: BRATEG por Marília, Kotizoj de IJK
- 60 Kalendaro: Okdek ok respondoj al: Kien?
- 62 Delegita Reto: Malĝusta vojo, La necesa kompletigo (anonco)
- 63 Nekrologoj (Haudebine, Lesznai, Petrov, Rajšić, Schmidt), Loke —
- 64 Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 65 Oficiala informilo el la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
- 66 La membraro de UEA en 1977 (membrostatistiko)
- 67 Ekzameno E (Bernard Golden)
- 68 Anoncetoj

La kovrilo

Jes, estas la "panjo" Tero, kiu ornamas nian ĉi-fojan kovrilon, fotita la 7an de decembro 1977 de "Meteosat", satelito de Eŭropa Spac-Agentejo, kies kun- laboranto inaŭguras en ĉi tiu numero nian novan rubrikon "Scienco". Sed la foto? Mirinda, ĉu ne?! Antaŭ proksimume 350 jaroj ĉi tia foto estus povinta multe faciligi la vivon al Galileo Galilei, kaj antaŭ 378 jaroj ĝi estus savinta la genian Giordano Bruno el la furiozo de la inkviziciaj flamoj.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esper- anto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj.

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jar- libro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265, 1/4p. 145, 1/8p. 85, 1/16p. 55 gld. Ne- movadaj komercaj entreprenoj pagas duoble. Anoncoj sur la ekstera kovril- paĝo kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool- singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj la Financa Programo: d-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; tele- fono (215) 259 8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri in- formado kaj kulturo: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., FK14 7HG, Britio; telefo- no (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (472) 44 80 85.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germanio; tel. (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona aga- do: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, finan- coj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoi- re Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; telefono (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-710 Mińskowek, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-rino Flora Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; tele- fono (072) 16 725.

Ludo kaj kostoj


POST prepara kunveno en junio pasintjare, en septembro 1977 sekvis la inaŭguro de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo, en Beograd. La tasko de la Konferenco estis ekzameni la plenumadon de la Fina Akto de Helsinki, subskribita de la ŝtatestroj de 35 landoj en aŭgusto 1975. Dum la pasintaj ses monatoj — tiom longe daŭris la Konferenco — la naci-lingvaj gazetaro, radio kaj televido tra la tuta mondo abunde raportis pri la maratona traktado en la jugoslavia ĉefurbo. Ne estas tasko de nia revuo trakti la politikajn aspektojn de la Konferenco, spite al la fakto ke la kunlaboro inter la homoj, popoloj kaj fine ankaŭ ŝtatoj ĉiam estis unu el la fundamentaj brikoj en la nefortika konstruaĵo de la Esperanto-movado. Tamen, alia aspekto de la Konferenco rekte tuŝas temojn pri kiuj ni ofte kaj skrupule raportadas. Ni ŝuldas la atenton pri tiu demando al la londona ĵurnalo *The Guardian*, kiu en sia numero de la 14a de februaro ĉi-jare aperigis la tekston "Alta prezo de parolplena konferenco". En tiu mallonga komento legiĝas ankaŭ jenaj frazoj:

"La efektiva prezo de la internacia malstreĉiĝo verŝajne montriĝos esti inter 750 kaj 1500 pundoj por ĉiu vorto, depende de la rezulto de la Beograda Konferenco. Ĉi tiu kalkulo baziĝas sur ekstrakto el la fakturo por la sumo de pli ol unu miliono da pundoj, kiun la jugoslaviaj gastigantoj ĵus transdonis al la 35 ŝtatoj subskribintaj la Finan Akton de Helsinki en 1975. La fakturo koncernas elspezojn por tri monatoj da interparoloj, el entute preskaŭ ses monatoj. La pli alta prezo de

1500 pundoj rilatas vortokoston de fina dokumento, laŭ la linioj de soveta propono . . . La malpli alta prezo estas kalkulita surbaze de pli detala, 3000-vorta projekto, kiun cirkuligis la neŭtralaj delegitaroj."

The Guardian donas al ni detaligon de pluraj eroj en la menciita fakturo. Inter tiuj detaloj almenaŭ ŝoka estas tiu ĉi: "La stabo de 37 interpretistoj kaj tradukistoj ricevas tagan salajron de 343 svisaj frankoj (90 pundoj), plus tagan aldonon de 2 675 dinaroj (ankaŭ proksimume 90 pundoj)."

Kun danko al *The Guardian* pro la elstarigo de ĉi tiu lasta "detaleteto", ni sidiĝu kaj kalkulu: 37 solvantoj de la lingva problemo, dum ses monatoj, kvin tagojn semajne, po — sume — preskaŭ 700 svisaj frankoj aŭ: 180 britaj pundoj aŭ: 800 guldenoj aŭ: . . . La kalkulo efektive kondukas al astronomie altaj ciferoj, kiuj montras, ke la lingvaj kostoj de la Konferenco proksimiĝas al eble du kvinonoj de la suma prezo de la Konferenco. Ne necesas emfazi, ke nur tiuj rektaj kostoj de la lingva problemo — sen la materialoj (pape-ro, elektro, maŝinoj kaj prizorgantoj), kiujn ili konsumigis — multoble superas la jaran buĝeton de la kom-pleta monda Esperanto-movado. Necesas eble demandi, kiu dum la pasintaj ses monatoj faris pli da utila, sen-pera, efika, ne-burokrata laboro por la proksimigo de la homoj kaj popoloj en Eŭropo, ĉu la internacia Esperanto-movado aŭ la pingpongantaj diplomatoj en la Beograda Konferenco. Du grandaj diferencoj okul-frapas inter la Movado kaj la konferencantaj politikis-toj: la unuaj praktikas kunlaboron kaj proksimigon de la popoloj, la duaj parolas pri ĝi; la unuaj faras sian laboron senpage kaj sinofereme, la duaj konsumas milionojn por sia altranga diplomata ludo. Ni foje kuraĝu fari ĉi tian konkludon, kiom ajn "naiva" kaj kontraŭa al la diplomatia kodo pri bona konduto ĝi estu. Ni kuraĝu alte taksi la rolon, kiun Esperanto jam



La jugoslavia ĉefurbo fieras pri la modernega Kongresa Centro "Sava" (modelo), kie dum la pasintaj ses monatoj okazis la Beograda Konferenco: Ĉu la nova kongresejo mem estas la sola reala postresto de la ĵus finiĝinta Konferenco?

ludas en la kunlaboro kaj proksimigo de la homoj kaj popoloj.

Kiam ni skribas tion ĉi, ankoraŭ ne estas publikigita la fina dokumento de la Beograda Konferenco. Mal-facilas supozi, ke ni en la dokumento trovos almenaŭ alineon pri la lingva problemo, kvankam UEA jam komence de majo pasintjare dissendis al la registaroj de ĉiuj 35 partoprenintoj en la Konferenco specialan dokumenton "Lingvaj problemoj kaj la Fina Akto; Komentario kaj rekomendoj pri la plenumado de la Fina Akto de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo". Maleblas ke la konferenco serioze traktis la lingvan problemon, sen ke ni jam — pere de

amas-komunikiloj — aŭdu pri tiu traktado. Dum la senfinaj debatoj en Beograd, al la lingva demando pleje proksimiĝis interveno de la hungara delegitaro, kiu la 8an kaj 9an de decembro 1977 en la 3a laborkomisiono de la Konferenco debatigis la bezonon de "plua agado por konatigo de la malpli disvastiĝintaj kaj esploritaj eŭropaj lingvoj kaj kulturoj". Ni atendu la finan dokumenton por vidi, ĉu la hungara interveno lasis spurojn en ĝi. Aŭ ni atendu la Madridan Konferencon en 1980, por verŝajne sperti la saman altnivelan kaj multekostan diplomatian ludon pri kunlaboro, kiel ni spertis dum la lastaj ses monatoj en Beograd.

sm

INFORMADO:

Favora klimato

EN ĈIUJ internaciaj, landaj kaj lokaj agadplanoj la informa laboro okupas altan lokon en la listo de la prioritataj taskoj. Tio estas pli ol normala ne nur en la Esperanto-movado sed en ĉiuj organizaĵoj kaj ĉe ĉiuj ideoj, kiuj celas disvastiĝon. Ankaŭ UEA ĉiam klopodis akcenti la gravecon de tiu laborkampo kaj doni sian propran kontribuon al la informado pri la Internacia Lingvo. Tamen, la efiko de tiuj klopodoj ĉiam dependis ne nur de la iniciatoj de UEA mem sed ankaŭ de la landaj informaj fakoj, kiuj pontis inter UEA kaj la nacilingvaj amaskomunikiloj, kiel la ĉefaj celoj de la informado. Aliflanke, kie la landa informa laboro estis bone organizita, tie la sukcesoj ne multe dependis de eventualaj iniciatoj de UEA.

Internacia Gazetara Servo (IGS) de UEA dum preskaŭ tri jardekoj ludis gravan rolon en la informa laboro en la Esperanto-movado. Iniciatita en 1950, IGS ĝis 1972 aperigis entute 201 Esperantajn kaj 68 nacilingvajn (ĉefe en la angla, sed ankaŭ en la franca lingvo) gaze-



Svedio multilate estas ekzemplo de bona informa laboro: En la radio-stacio de la provinco Västmanland oni surbendigas 25-minutan programon pri Esperanto, elsenditan komence de januaro 1978.

tarajn komunikojn. Inter 1973 kaj 1977, oni faris plurajn sensukcesajn provojn revivigi IGS. Fine, en decembro pasintjare subite aperis 3 komunikoj, en januaro ĉi-jare eldoniĝis 4 kaj en februaro 2 pliaj bultenoj. La afero do ekmarŝas denove, ĉefe dank' al la fakto, ke en novembro pasintjare al la Volontula Servo de UEA aliĝis s-ino Anna Brennan, kiu montris intereson kaj kompetenton pri la informa laboro.

Tiuj lastatempaj bultenoj de IGS iris al centoj da nacilingvaj ĵurnaloj kaj al dekoj da movadaj adresoj tra la mondo. Kvankam oni havas tre supraĵajn informojn pri la utiligo de tiuj bultenoj, jam pruviĝas, ke la laboro valoris la penon: Krom aperigoj en nacilingvaj ĵurnaloj de kelkaj landoj kun forta Esperanto-movado, pri tiuj tekstoj interesiĝis ankaŭ gazetoj en Irano kaj — kio pleje surprizas — en Turkio, kie almenaŭ du ampleksaj tekstoj de IGS estis transprenitaj de influa ĵurnalo kun tutlanda legantaro.

Tamen, necesas atenti, ke ĝuste sur la informa laboro tereno la Movado spertas gravajn ŝanĝojn dum la lastaj jaroj. Iam por ni estis ĝojiga novaĵo ĉiu mencio de Esperanto en la nacilingvaj amaskomunikiloj, ĉar tiuj mencioj estis maloftaj. En kelkaj landoj ankaŭ nun estas tiel. Sed en la plimulto de la landoj Esperanto aperas ĉiam pli ofte en la nacilingva gazetaro. En nia februara numero vi eble eĉ ne rimarkis informon (p. 36), ke en Norvegio dum 1977 aperis pli ol 300 novaĵoj kaj artikoloj pri la Internacia Lingvo. Simile estas en Pollando, Francio, Jugoslavio, Irano, Hungario, Japanio, Kolombio, Brazilo ktp. Oftaj estas radio-programoj pri Esperanto (Venezuelo, Svedio, Britio) kaj eĉ televidaj elsendoj (Francio, Italio).

Ĉio ĉi estas signo, ke la merkato por niaj novaĵoj maturiĝis. Samtempe, tio estas postulo pri nia informa matureco kaj livero de bone redaktitaj kaj zorge elektitaj novaĵoj. IGS povus tiurilate ludi gravan rolon. Por pli precize difini tiun rolon, bonvenus komentoj pri la lastatempaj aperintaj bultenoj kaj precipe informoj pri la transpreno de tiuj bultenoj en la nacilingvajn gazetojn. Kompreneble, bonvenaj estas ankaŭ novaĵoj, ne nur por IGS sed ankaŭ por ĉi tiu revuo. Se la klimato por Esperantaj novaĵoj efektive plifavoriĝis, ni faru komunan klopodon eluzi tiun favoron kiel eble plej prudente kaj efike.

Jubilea meditado

KIAL aŭskulti esperantlingvajn elsendojn? Ĉar tio estas la plej praktika, komforta, malplej temporaba maniero ekscii ion novan, esti informita pri movadaj okazaĵoj, aŭdi bonan lingvon kaj sidi aŭ kuŝi hejme.

Radio estas multe pli internacia ol televido. Radio-ondoj facile transpasas landolimojn. Ĉiu mem povas trovi la ĝustan ondon sur sia radio-ricevilo. Televidaj kanaloj, por nun, kunligas preskaŭ ĉie nur partojn de la propra lando, eventuale ankaŭ kelkajn pli proksimajn de la najbara. Sed, ĉar televidaj Esperantaj programoj estas pli ol raraĵo, tiu fakto por la Movado nun ne estas problemo.

Homoj vivantaj en izolaj lokoj, homoj malsanaj, maljunaj, kiuj ne vizitas Esperantajn rondojn nek renkontiĝojn, pere de radio-elsendoj konstante povas esti en internacia kontakto. Jes, pasiva, ĉar pere de radio oni ne povas diskuti. Sed nura aŭdado de la lingvo, se konstanta, garantias ne nur neeblon forgesi ĝin, sed eĉ helpas plibonigi ĝin.

Kursoj organizitaj de niaj societoj — iam tiom floranta aktivado — nun ne bone sukcesas, ĉar — simple — la



Esperanto-programoj de Radio Zagreb kvaronan jarcenton en la etero: De maldekstre: Judita Hudeček kaj Damir Mikuličić, geparolistoj, Emilija Lapenna, gvidanto de la elsendoj, kaj David Rey, boliviano, kandidata parolisto.

nuntempa homo ne volas elspezi tempon dum 2-3 monatoj por unu- aŭ dufoja semajna veturado al kursejo. Post mallonga tempo lernantoj malaperas. Kun helpo de radio-elsendoj, ĉiu povas mem ellerni la lingvon studante simplan lernolibron kaj aŭskultante la vivantan lingvon el pluraj urboj pere de radio-ondoj.

Tion sciis la iniciatintoj de niaj esperantlingvaj programoj en aprilo 1953. Ekde tiam anteno de Radio Zagreb (ondolongo 265m), ĉiuvendrede (laŭ MET),

5 minutojn post la noktomezo, disaŭdigas "Parolas Radio Zagreb. Ni komencas nian elsendon en la Internacia lingvo Esperanto." Tiel 25 jarojn. Malgraŭ multaj malfacilaĵoj, malgraŭ ne tro abunda helpo de esperantistoj, ĉiam same fervore, akurate kaj maksimume atentante interesojn de la aŭskultantoj, en la kadro de la eblecoj.

En la nomo de Radio Zagreb, Esperanto-fako, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio, salutas vin

Emilija Lapenna.

Lisbono, Moskvo

RADIO-ELSENDOJ sendube estas unu el tiuj kampoj sur kiuj la Internacia Lingvo gajnis konsiderindan popularecon kaj estas simple uzata kiel komunikilo, samrange kiel aliaj lingvoj uzataj por internaciaj radio-programoj. Kio pleje gravas estas la fakto, ke la Esperantaj radio-programoj kalkulas pri esperantistoj nur kiel pri sia publiko, dum ĉiuj kostoj de tiuj elsendoj estas kovrataj el la kutimaj, ne-movadaj, fontoj. Ĉio ĉi signifas, ke la Internacia Lingvo sur ĉi tiu kampo jam spertas specon de apliko sopirata ankaŭ en aliaj sferoj de la internacia vivo. Jen du pliaj bonaj novaĵoj pri Esperanto en radio:

Ekde la 5a de februaro 1978, al la jam impona listo de la radio-stacioj, kiuj regule elsendas programojn en la Internacia Lingvo, aldoniĝas ankaŭ Portugala Nacia Radio. La programoj konsistas el kroniko de portugalaĵaj okazintaĵoj kaj estas preparataj kunlabore kun Portugala Esperanto-Asocio. Esperantaj elsendoj okazas en la kadro de la tria programo de Lisbono kaj estas aŭdeblaj dimanĉe, en Eŭropo, inter la 18h20 kaj 18h30, kun ripetigoj je la 20h50, 21h20, 21h50 kaj 22h20, laŭ la greniĉa tempo. Lunde la programoj estas aŭdeblaj en Sud-Ameriko inter la 01h20 kaj 01h30, kun ripetigo je la 02h50, laŭ la greniĉa tempo. La ondolongoj por Eŭropo estas: 49.79m (6025kHz) kaj 30.80m (9740 kHz), dum oni en Sud-Ameriko devus aŭdi la programon je 31.13m (9635kHz) kaj 25.42m (11840kHz). Ĉiuj raportoj pri la aŭdebleco kaj kvalito de la programoj estas bonvenaj al jena adreso: Radio Difusão Portuguesa, Internacia Fakto (Esperanto), Rua do Quelhas, Lisboa 1, Portugalio.

Kiel ni antaŭanoncis en la februara numero (p.36), en la kadro de la itallingvaj elsendoj de Radio Moskvo, la 4an kaj 5an de februaro estis disaŭdigita kvaronhora programo en Esperanto. Ĝi konsistis el skizo de la historio de la Esperanto-movado en Soveta Unio (fare de s-ro S. Podkaminer), raporto pri nunaj agadoj de sovetaj esperantistoj kaj informoj pri kelkaj planoj por la proksima estonteco. Laŭ pluraj informfontoj, temis pri eksperimenta elsendo. Se la interesiĝo estos kontentiga, Radio Moskvo komencos regule elsendi en la Internacia Lingvo. Tial ankoraŭ ne estas malfrue skribi al: Radio Moskvo, Esperanto-programo, Moskvo, Soveta Unio.

La alia flanko de la medalo

La unua versio de la sekva teksto venis al ni antaŭ plena jaro. Ni tiam resendis ĝin al la aŭtoro, kun peto pri kelkaj precizigoj. Sed intertempe prof. Wüster forpasis (v. nian numeron de majo 1977, p. 83) kaj tio provizore blokis la publikigon de la teksto, kiu starigas kelkajn gravajn demandojn pri la rilato de la mortinta scienca eminentulo al la Internacia Lingvo.

TRE GRAVA por la Movado estas la apogo de profesiaj lingvistoj. Kaj tial ni ĝojas pri la reeldono de *Konturoj de la lingvonormigo en la tekniko*¹ de la mondfama aŭstra profesoro pri terminologio, E. Wüster, kiu forpasis pasintjare, en la aĝo de 79 jaroj. Sed, ĉu Wüster vere apogis Esperanton? Antaŭhieraŭ jes, hieraŭ ne. Li ekverkis en 1923 ambician enciklopedian vortaron, kiu estus povinta prezenti gravan alternativon de *Plena vortaro*. Sed li heredigis al la Movado la vortaron nur ĝis la vorto "korno" (1931)². Ĉu la esperantistaro montris nesufiĉan intereson, ĉu la verko estis tro ambicia, aŭ, ĉu eble alia intereso altiris la aŭtoron? Evidente la normigo de la naciaj faklingvoj estas io same ambicia. *Konturoj*, kiu esence estas traduko de la doktoriĝa tezo de Wüster (*Internationale Sprachnormung in der Technik*) fare de E. Pfeffer en la jaro 1936, entenas ardan pledon por Esperanto. Ĝi enhavas gravan ĉapitron pri vortanalizo, kiu estas tre malfacile legebla por la neprofesiulo pro la manko aŭ malklareco de difinoj de bazaj nocioj (kunordado, kozo, apozicio, determino, devionomo, nocioformo,...).

En la piednotoj de *Konturoj* jam evidentiĝas la ŝanceliĝo de Wüster. "Laŭ la disvastiĝo,... havas Esperanto tioman antaŭecon," (kompare kun alia same bona planlingva projekto, Novial) "ke nur normiga korporacio de nelimita aŭtoritato povus prirespondi, se ĝi deklarus alian planlingvon kiel devigan." Tamen, la Internacia Normiga Organizaĵo (antaŭe ISA, nuntempe ISO) "havas tiel grandan influon al la praktika vivo, ke eĉ kontraŭ la esperanta movado ĝi povas realigi ĝin. Tial ISA kiel bazon por la Kodo povas konsideri krom Esperanton ankaŭ solvojn deriveblajn de Occidental. Tamen,... la Kodo en neniuj okazo rekte konkuras kontraŭ Esperanto." La normigaj komitatoj revis ĉirkaŭ 1936 pri aldono de nove kreitaj kodaj vortoj al la listoj de interkorespondaj nacilingvaj terminoj, do fakte pri la kreo de internacilingva vortaro, nomita la Kodo en la supra citaĵo (p. 121, 122).

1 *Konturoj de la lingvonormigo en la tekniko* (1931), E. Wüster (1898-1977). El la germana trad. E. Pfeffer. Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, 1975. 130p. 20cm. ISBN 87 85020 842. Prezo: 11,10 gld.

2 *Enciklopedia vortaro Esperanto-germana*, Eugen Wüster. Leipzig: Hirt & Sohn, 1923. Partoj 1 ĝis 4 (A ĝis KOR), entute 576p. 26cm. Prezo ĉe la Libroservo de UEA: 54,00 gld.

La inkludo de Esperantaj tradukoj (kompilitaj de Wüster) en la *Internacia elektroteknika vortaro* de 1938 en postaj eldonoj denove perdiĝis. La inĝenieroj ne povis kompreni Esperanton post nulhora studado kaj fortimiĝis pro la slavlingve aspektaj supersignitaj literoj. (Nur francoj rajtas per é, è, ê, aî, oî, ç, kaj la germanoj per ä, ö, ü malbeligi la latinajn literojn!). Kaj tio igis Wüster konsili en la Unesko-raporto de 1957 "Scienca kaj teknika tradukado", ke Esperantaj resumoj prefere ne aperu en ne-Esperantaj revuoj, ĉar ili faras pli da malbono ol bono por la afero. Kontraŭe, Wüster ĉi tie vidas nenion oponendan en la uzo de Interlingua (planlingva projekto, kiu laŭaserte estas tuj legebla por sciencistoj/teknikistoj) por akompanaj resumoj de sciencaj artikoloj en naciaj lingvoj.

Bone notu, ke tio estas la tria projekto kiun Wüster apogas, antaŭ ol elpensi propran projekton, kiun li baptis "Terminologi-ŝlosilo" (*Sprachnormung*, § 72 B6). Neniu devigis lin, la iaman esperantiston kaj aŭtoron de *Maŝinfaka Esperanto-vortaro prielementa*, *Zamenhof-radikaro*, *Fizikaj grandoj kaj iliaj unuoj*, tradukinton de *Petro Schlemihl*, *La kantistino*, doni tiun komenton en la Unesko-raporto, sen la evidenta kontraŭargumento, kiun li mem donis jam antaŭ 1936: "Per tio Occidental havas la superecon, ke la konantoj de l'okcident-eŭropaj lingvoj povas legi ĝin preskaŭ sen gramatikaj antaŭscioj" (p. 103). Sed, "por profiti de la fremda literaturo sufiĉas la kutima lerneja scio de la angla kaj franca lingvoj" (p. 104).

En 1956 Wüster skribis, ke li bezonis ĉirkaŭ 25 jarojn por kompreni, ke estas necese intersimiligi la eksterajn de la naciaj fakterminoj sen samtempa kreado de internacia lingvo por la komunikado de homo al homo. (*Scienca revuo* 1956, p. 33).

Okaze de la reeldono de *Sprachnormung* en 1966 Wüster ĝisdatigis sian disertacion per kelkaj nesciencaj privataj opinioj. Li ankoraŭ laŭdas, ke Esperanto estas viveca kaj povas entuziasmigi, kontraŭe al ekz. Terminologia ŝlosilo, kaj ke la peno por lerni Esperanton estas tiom malgranda, ke ĝi valoras tiun penon, malgraŭ sia malmulta disvastiĝo. Tamen, Esperanto havas, laŭ Wüster, kompare kun Terminologia ŝlosilo, decidigan malavantaĝon: komprenas ĝin nur tiuj kiuj lernis ĝin. Tiu malavantaĝo de Esperanto ŝajnis al Wüster unue nur provizora, sed, post la sperto de ĉirkaŭ 75 jaroj,

oni forlasu la esperon pri la ĝenerala enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

La malinklino al Esperanto de la ĉiam pedante detalema Wüster ankaŭ evidentigas el mencio, ke la uzo de Esperanto kiel "klara lingvo" estis permesita de la Universala Telegrafa Unio ekde 1925, sed ke ĝi jam perdis tiun kvaliton en 1932 (*Sprachnormung* 1966, p. 428). Laŭ *Esperanto en perspektivo* (p. 760) tiu decido de 1925 restis sensanga kaj plu validas. La postaj revizioj, en 1949 kaj 1952, kaj la hodiaŭa versio formulas la permeson por Esperanto (same kiel por la Latina) tute eksplicite. Wüster do eraras: la revizio de 1932 nenion reprenis.

Evidente, Wüster forlasis Esperanton, vi konstatos. Sed tamen li membris en la redakta komitato de *La monda lingvo-problemo* kaj en 1970 li oficis kiel rektoro de Internacia Somera Universitato. Ĉu tio estis nur mal-sincera ŝajnigo, iomete kiel faris de Beaufront, kiu aktivis por Esperanto kovante sian Idon?



Post jardekoj, la lasta reapero sur la movada scenejo: En Vieno (1970) parolas la rektoro de ISU, prof. E. Wüster.

Laŭ komuniko de ing. H.J. Plehn³, intima kunlaboranto de Wüster dum multaj jardekoj, li spirite forlasis Esperanton jam inter la du mondmilitoj, kaj la proceso de neado de esenca parto de la unua duono de lia vivo okazis en la daŭro de nur kelkaj semajnoj.

Ĉu eble Wüster estis iom tro impresigema en diskutoj kun aliaj homoj? Kiuj, do, estas tiuj "senantaŭjuĝaj, multesciantaj, mondspertaj viroj" al kiuj li dankas la bazajn komprenojn pri la eblecoj de la internacia lingvonormigo (*Sprachnormung*, p. 422)? Kaj kiuj, ankoraŭ, estas tiuj "konantoj de la eŭropaj lingvoj", kiuj fortimiĝas de ekz. la finaĵoj -aj, -oj, -ajn, -ojn

³ Ing. Hans Joachim Plehn (Bienensteingasse 3, A-3250 Wieselburg, Aŭstrio), UEA-delegito, dum pluraj jardekoj estis scienca sekretario de Wüster. Laŭ lia lastatempa informo, la familio de Wüster nun serĉas eldonejon por kompletigi la *Enciklopedian vortaron*, kiu do ekzistas en manuskripta, ne finredaktita, formo.

(*Sprachnormung*, p. 433)? Ili certe ne riproĉis la aŭstrojn, ke ili produktas "Kein feine Rhein-wein. Nein!" (kajn fajne rajn-wajn. Najn), nek iam gruntis pri iu angla "boy, whining: that fine coin is mine!" (boj, vajning: dhet fajn kojn iz majn). Aŭ, ĉu Wüster nur oportunisme servas sin de tiuj personoj, por pravigi siajn ŝanĝigemajn planlingvajn projektojn?

Okaze de la reeldono de *Konturoj* en 1975 Wüster ne tiel malkaŝe konfesis sian forlason de Esperanto. Fakte li kaŝis sian sintenon malantaŭ komisiona rezolucio de ISA/ISO de la jaro 1938, kiu markis malinklinon al Esperanto kaj anticipon de Terminologia ŝlosilo:

"Oni konsideras necesa, establi unuecajn regulojn por formado de kodaj vortoj... Tiuj reguloj prezentos specon de Terminologia ŝlosilo al la jam ekzistantaj internaciaj fakterminaroj... Ili devas konduki nek al perforta miksado de lingvoj, nek al kripligo de vortformoj, kiuj jam estas preskaŭ internaciaj." (*Konturoj* p. 125)

En tiu rezolucio troviĝas tri eraroj:

1. Ĝi ne distingas analizajn disde sintezaj reguloj. Evidente oni bezonas pli da reguloj por kompreni ĉiujn ekzistantajn terminojn ol por unuece formadi novajn kodajn vortojn.
2. Ĝi opinias miksadon de lingvoj perforto. Tio estas nescienca opinio. La fama etimologia verko de W.W. Skeat donas la vortlistojn de deko da lingvoj el kiuj la angla pruntis gravajn kontribuojn. Multaj lingvoj aldonas siajn afiksojn al pruntitaj radikoj, ekz. la nederlanda havas *rangeerde* de la franca *ranger*, kaj *geraced* de la angla *race*. La internacia *automobile* devenas de la greka *autos* kaj la latina *mobilis*. Lingvo evidente kapablas alpreni vortojn el ajna alia lingvo, eĉ se ili malbone harmonias pro ortografio, prononco aŭ konjugacio. Dependas nur de tio, ĉu la pruntedonanta lingvo estas populara aŭ utila.
3. Kripligo de preskaŭ internaciaj vortformoj estas akceptata en naciaj lingvoj eĉ pro malpli gravaj konsideroj ol la evitado de homonimoj aŭ la ebligado de regula derivado. Ekz. la nederlanda *trafo* por la internacia *transformatoro*. La angla *hifi* disvastiĝis en mallonga tempo tra multaj lingvoj, kvankam ĝi estas kripligo de la preskaŭ internacia (*high*) *fidelit(y)*.

Tamen, Wüster opinias (*Konturoj* p. 126), ke "Estas evidente ke la direktivoj de ISO povus esti utilegaj ankaŭ por la disvolvo de la faklingva Esperanto kaj de ĝia leksikografio", donante la referenc-numerojn de ses ISO-rekomendoj. Kaj li daŭrigas senmalice:

"La rekomendo R 860 'Internacia unuecigo' eĉ estas unua paŝo en direkto al la koda projekto de antaŭ la milito." Ĉi tiu rekomendo estas tamen malutilega, ĉar ĝi pavimas la vojon pli ĝuste por la Terminologia ŝlosilo, ol por Esperanto. Se Esperanto volus kunpaŝi kun tia koncepto pri internacieco, oni unue devus lerni la latinan gramatikon.

Vi eble pensas: kiom nin koncernas tiu Rekomendo R 860, kiu estas ankoraŭ pli nekonata ol Esperanto?

Atentu, tamen, ke tiuj rekomendoj de ISO estas morale devigaj por la naciaj normkomitatoj. Kaj la naciaj normoj ofte atingas juran staton. La libro *The Road to Infoterm* (La Vojo al Infoterm, iom kaosa verko de Wüster el la jaro 1974) informas, ke la Rekomendo R 860 kondukis al naciaj normprojektoj jam en tri landoj. Do kio okazos se ISO daŭrigas siajn por Esperanto malfavorajn agadojn? Wüster volas kredigi nin, ke tiuj rekomendoj estas la rezulto de jardekoj da traktado inter pli ol 40 norminstitutoj kaj 30 internaciaj organizaĵoj (*Infoterm Series 3*, p. 33). Sed ĉiu, kiu partoprenis en organizaj laboroj, scias, ke la ideoj kaj proponoj de la iniciatanto persistas ofte sen gravaj modifoj en la fina rezulto. Tiun fakton eĉ Wüster perceptis, kiam li konstatis, ke la kreo de la hodiaŭaj terminologiaj institucioj estas la laboro de kelkaj homoj: "historio estas kreata ĉiam de unuopuloj" (*Infoterm Series 3*, p. 34). En nia kazo ni rajte supozas, ke la

Rekomendo R 860 preskaŭ tute originas el la proponoj de unu persono kaj, ke la cetero restis inter la skribotabloj de kelkaj specialistoj, ekzemple, en la Aŭstria Norminstituto, kie Wüster sceptrumis. Mi estas konvinkita, ke tiuj 70 organizaĵoj ne ĉiuj estas decidemaj kontraŭantoj de Esperanto, sed ke eble ili sen nia interveno kondukigos al akceptigo de la lingvo-projekto de Wüster.

Nur kun bedaŭro oni povas fantazii pri la nuna pozicio de la Internacia Lingvo, se tiu geniulo ĝis la vivofino estus uzinta sian mondiskalan influon por la antaŭenigo de Esperanto. Bonŝance, oni anoncas baldaŭan eldonon (ĉe TK) de *Esperantologiaj studoj* de la forpasinta profesoro Wüster, Honora Membro de UEA. Eble tiu nova volumo sukcesos prezenti la gravan lingvistan apogon en maniero alia ol ni vidis ĝin ĉi tie. Ni atendu por legi!

D-ro Rob Vetter

LIBROMERKATO:

Kiel fartas libroj?

KVANKAM estas riske (pro la inflacia prezaltiĝo) fari tiajn kalkulojn, komparo de la vendosumoj en la plej granda movada vendejo — la Libroservo de UEA — montras, ke dum la lastaj kvin jaroj la librovendoj kreskis je 40%. Antaŭ kvin jaroj (en 1973), la Libroservo vendis por 93 500,00 guldenoj, en 1974 la vendoj sumiĝis je pli ol 117 000,00 gld., por en 1975 atingi rekordan sumon de preskaŭ 162 000,00 gld., kio ĉefe ŝuldiĝis al la fakto, ke tio estis la unua vendojaro de *Esperanto en perspektivo*. En la jaro 1976 la vendoj reiris al la "normala" nivelo kaj atingis 113 913,96 gld., por en la jaro 1977, sen evidenta kialo, svingiĝi al 131 632,10 guldenoj.

Tamen, la pasintjaran vendokreskon facile povus klarigi du gravaj faktoroj: 1) La Movado spertas gravan vigliĝon de la eldona aktiveco (BEA, Esperantaj kajeroj kaj Kardo en Britio; TK nun en Belgio; KCE en Svislando; Gabrielli, Nuova Frontiera, IKUE kaj Literatura Foiro en Italio; JELK, Omnibuso, Pirato, Ludovikito kaj JEI en Japanio; Fondumo Esperanto en Finnlando; Hungara Esperanto-Asocio; Eŭropa Klubo en FR Germanio; Argentina Esperanta Muzik-Eldonejo ktp.). Krome, pluraj jam bone konataj eldonejoj (DEF en Danlando, Esperanto Publishing Co. en Aŭstralio, Fremdlingva Eldonejo en Ĉinio, FEB en Brazilo, Argentina E-Instituto, SUK en Belgio, SAT en Francio, Vulpo en Nederlando, SEL en FR Germanio) agas kun la kutima fervoro. Aldone, Esperantaj libroj ĉiam pli ofte aperas ĉe nemovadaj eldonejoj (Eesti Raamat en Soveta Unio, Edition Leipzig en Germana DR, Bleicher Verlag en FR Germanio, Iwanami en Japanio, Atai Press en Irano). 2) En aŭgusto pasintjare aperis *Katalogo 1977/78* de la Libroservo de UEA, kies kontribuo al la movada libromerkato certe ne estas malgranda.

Ni tamen revenu al vendoj dum la jaro 1977 kaj iom pristudu nian jam tradician liston de la pleje vendataj titoloj. Jen tiu listo, en kiu sian lokon ĉiu libro elbatalis per la nombro de senrabate venditaj ekzempleroj:

1. *Esperanto en perspektivo* (Lapenna, Lins, Carlevaro) gld. 84,00
2. *Ĉu vi kuiras ĉine?* (J. Valano) 12,30
3. *Kantoj kaj poemoj de R. Burns* (Auld, M. Hill) — disko/kaseto 14,40/15,90
4. *Plena ilustrita vortaro* (Waringhien k.a.) 99,00
5. *Plena vortaro* (Grosjean-Maupin k.a.) 19,20
6. *Rimletoj* (Auld, Boulton) 4,50
7. *Concise Dictionary of 26 Languages* 8,40
8. *Concise English and Esperanto Dictionary* (Wells) 9,00
9. *Primico* (Tagor/Daŝgupto) 10,50
10. *Problemy interlingvistiki* (Isaev k.a.) 4,50
11. *Transe* (Lorjak) 22,20
12. *Kruko kaj Baniko* (Beaucaire) 16,00

Rapidu por Belartaj Konkursoj

Estas malfrue nun verki; restis apenaŭ tempo por fintaĵi la konkursaĵojn de Belartaj Konkursoj 1978. Ĉiuj konkursaĵoj devas atingi antaŭ la fino de marto la sekretarion de BK, s-ron Alec VENTURE, 7 Grosvenor Road, Wallington, Surrey SM6 0EG, Britio. La sola escepto estas la konkursaĵoj por la branĉo "Fotografio", kiuj iru — antaŭ la fino de junio — rekte al: 63a Universala Kongreso de Esperanto, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia, Bulgario.

- | | | |
|-----|---|---------------------------|
| 13. | <i>Metropoliteno</i> (Varankin) | broŝ. 24,00 / bind. 32,70 |
| 14. | <i>Arĝenta duopo</i> , vol 2 (Baghy, Kalocsay) | 3,00 |
| 15. | <i>Lingvo, stilo, formo</i> (Kalocsay) | 6,60 |
| 16. | <i>Pri internacia lingvo dum jarcentoj</i>
(Dratwer) | 30,00 |
| 17. | <i>Winnie-la-Pu</i> (Milne/Reed, Lewin) | 18,00 |
| 18. | <i>La Sankta Biblio</i> | 18,50 |
| 19. | <i>Aktoj de la Akademio</i> , vol. 1 | 5,00 |
| | <i>Epifanio</i> (Shakespeare/Auld) | 9,00 |
| | <i>Facetoj de Esperanto</i> (Auld) | 4,80 |
| | <i>Tra l'mondo</i> (Tzaut) — disko/kaseto | 28,80 |
| 20. | <i>Aktoj de la Akademio</i> , vol. 2 | elĉerpita |
| | <i>Elektitaj verkoj</i> , vol. 4 (Maŭ Zedong) | 9,00 |
| | <i>Ni kantu en Esperanto</i> — disko | 22,20 |

Certe ne estas surprizo, ke *Esperanto en perspektivo* jam la trian jaron sinsekve estas ĉe la pinto de nia listo de furoraĵoj. Tio estas plia pruvo pri la unika valoro de tiu enciklopedia kompendio pri ĉiuj aspektoj de la Internacia Lingvo kaj la Esperanto-movado. Simile, oni povas komenti la altrangajn lokojn, kiujn en la listo okupas *Plena ilustrita vortaro* kaj *Plena vortaro*, tiuj du ne malhaveblaj valoraj. Vera surprizo estas la dua kaj tria lokoj por la romano *Ĉu vi kuiras ĉine?* kaj la disko/kaseto *Kantoj kaj poemoj de Robert Burns*. Se ni bone memoras, tiuj du eldonaĵoj trabatalis sian lokon en la supron de la listo sen ajna reklamo, kio do devus signifi — sole per sia kvalito. Oni devus aparte ĝoji, ke tio jen okazas ankaŭ kun originala romano en la Internacia Lingvo.

Kelkaj eldonaĵoj aperis tro malfrue en la jaro por eniri ĉi tiun liston. Tio aparte koncernas la majstroverkon de Cervantes *Don Quijote*, kiu jam nun promesas esti en la sekvanta listo. Ankaŭ la ĵus aperinta *La granda kaldrono* de John Francis certe enmiksiĝos en tiun batalon.

Ĉar temas pri libroj, jen du aliaj atentindaĵoj: Lastatempe la Libroservo de UEA faris interkonsenton esti la ĉefa distribuejo de ĉiuj eldonaĵoj de la eldonejo TK. Tio signifas, ke UEA donas al la revendistoj de ĉiuj TK-libroj la kutiman rabaton de 33%, same kiel por la eldonaĵoj de UEA mem. Aliflanke, la pasintjare anoncita kunlaboro inter la eldonejoj Stafeto kaj TK ankoraŭ ne realiĝis kaj la libroj de Stafeto ankoraŭ restas nehaveblaj. Cetere, se la prestiĝaj volumoj de la eldonisto Juan Régulo troviĝas sur la merkato, nia ĉi-supra listo grave malsimilus al sia nuna aspekto. La klientoj de la Libroservo de UEA bonvolu do havi paciencon pri la Stafeto-libroj, kies rehaveblon ni anoncos en ĉi tiu revuo.

Fine, ni diru ion pri la teknika kvalito de la lastatempaj eldonaĵoj en la Internacia Lingvo: Unuflanke, ni havas ankaŭ fizike imponajn volumojn — *Don Quijote* (Fundación Esperanto), *Metropoliteno* (TK), *Izolo* (UEA), *La kaŝita vivo de d-ro Zamenhof* (JEI), *Hebreo el la geto* (Ludovikito), *La granda kaldrono* (TK), *Mastro de Kôrboja* (Eesti Raamat), *Trigroŝa romano* (Bleicher), *Tra l'mondo* (Tzaut) kaj pluraj aliaj —, kies

aspekto estas tute profesinivela. Aliflanke, la movada libromerkato estas superŝutata per stencilaĵoj libroformaj, kies produktokvalito estas ofte tia, ke ni el kelkdeko da ekzempleroj ne sukcesas elekti senpekan volumon por la Biblioteko Hodler de UEA. Oni emas kredi, ke tiuj teknike malkontentigaj eldonaĵoj estas malpli kostaj ol la bone presitaj volumoj. Tio tamen estas eraraj pensoj, kun la sola escepto de la broŝura serio de *La juna penso*, kies libroj efektive kostas malpli, ol se ili estus presitaj. La eldonaĵoj de Someraj Universitataj Kursoj (Belgio), Kultura Centro Esperantista (Svislando), Hungara Esperanto-Asocio, Argentina Esperanto-Instituto, Esperanto-Centro Paderborn (FR Germanio) kaj kelkfoje eĉ de Fondumo Esperanto (Finnlando), malgraŭ sia teknika subniveleco, preze ne diferencas de la fizike bonkvalitaj eldonaĵoj. La eldonejo Vulpo (Nederlando) kvazaŭ specialistiĝis en la eldonado de broŝuretoj, bone presitaj, kiuj malofte superas unu presfolion.

Ĉio ĉi, kiom ajn enhave bonkvalita, kreas konfuzon sur la movada libromerkato kaj montras kompletan mankon de kunlaboro inter la eldonejoj. Estis verŝajne Stafeto, kiu per la profesieco de siaj volumoj dum la pasintaj dudek kvin jaroj malhelpis la nun spertatan diserigitecon de la eldona aktivado. Feliĉe, la eldonejo TK lastatempe promesas restarigi la forgesitajn teknikajn normojn pri la aspekto de la Esperanta libro. **sm**

HUNGARA



VIVO

HUNGARA VIVO estas dumonata kultura revuo, aperanta ekde 1961 en Hungario. Ĉiu numero aperas sur 32 paĝoj, plus kovrilo, en la formato 28,5x20,5cm. Krom la prezento de la klasika kaj nuntempa hungara kulturo, ĝi dediĉas ampleksan spacon ankaŭ al la originala Esperanta literaturo. Sur ĝiaj paĝoj ofte aperas verkoj de Auld, De Kock, Goodheir, Miyamoto kaj aliaj elstaraj figuroj de la Esperanta literaturo.

Abonebla ĉe UEA kontraŭ 19,50 (por Nederlando 20,28) guldenoj.

Al matematika terminaro

AL LA JUNA (fondita en 1974) Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj (IAdEM), kunlaboranta faka asocio de UEA, ne mankas laboro. Krom diversaj fakaj agadkampoj (tradukado kaj kolektado de divers-specaj matematikaj problemoj, didaktiko de matematiko diverslande, ktp.), ĝi transprenis la pezan taskon respondi pri la matematika terminologio en Esperanto.

Sen taŭga terminologio ne eblas taŭge praktiki matematikon. Tamen, oni ne devas atendi, ke ĉiuj terminologiaj problemoj estu solvitaj por ekverki pri matematiko. Pri tiu duobla aspekto de la problemo bone konscias IAdEM. Ĝi unuflanke aperigas revuon, *Matematiko translimen*, kaj tiel instigas la membrojn tuj verki pri ĉiaspecaj matematikaj temoj en Esperanto; aliflanke, ĝi prilaboras matematikan terminologion preparante plurlingvan matematikan terminaron kun difinoj en Esperanto.

Jam ekzistas pluraj plurlingvaj terminaroj pri matematiko, sed ili estas sen difinoj. Nuntempe, IAdEM kunlaboras kun la Kibernetika Instituto (FEOll) en Paderborn (FR Germanio) por eldoni tradukon de matematika vortaro de Meschkowski. Tamen, necesos ankoraŭ pluraj jaroj da strebado por atingi kontentigan rezulton koncerne matematikan terminologion. Tio signifas, unuflanke, registri ĉiujn terminojn aperintajn en la Esperantaj matematikaj libroj, kaj aliflanke, pri-skribi la ekzaktajn signifojn kaj uzmanierojn de ĉiuj konsilindaj matematikaj terminoj, esprimoj aŭ simboloj, kaj de la ekzakta diferenco inter proksimaj nocioj. Ĉar, eĉ se oni limigas sin je mil aŭ du mil plej oftaj kaj fundamentaj terminoj, oni konstatas, ke tiu dispartigo de la diversaj nocioj inter la diversaj terminoj multe varias de unu lingvo al alia.

IAdEM aperigas ankaŭ jarlibron kun multaj informoj pri la membroj kaj iliaj matematikaj specialismoj, — tiel ke ili havu eblecon korespondi inter si. Se vi deziras pli da informoj pri IAdEM, vi povas skribi al la sekretario: François Lo Jacomo, 14 rue de la Pompe, F-75016 Paris, Francio. Kaj eĉ sen aliĝi al IAdEM, vi povas profiti ĝian ekziston, dank' al aktiva problem-servo: Ĉu vi ne konas matematikajn problemojn, kiujn vi ne kapablas solvi mem, sed kies solvon vi ŝatus scii? Ne hezitu: petu helpon de IAdEM, spertuloj respondos al vi.


François Lo Jacomo

Surprizoj el Kubo

SEKVE de vigligo en la jaroj 1972-1974, oni atendis baldaŭan ŝtatan aprobon de Kuba Esperanto-Asocio. Ĉar tiu aprobo ne okazis, la vikleco de la Esperanta agado en tiu kariba lando rapide komencis malkreski. Tamen, lastatempe venis al ni pluraj informoj el kiuj ni konkludas, ke Kubo denove spertas vekiĝon de la landa Esperanto-movado, ankoraŭ ĉiam sen oficialigita ekzisto de la landa asocio.

Ŝajnas, ke al tiu revekiĝo pleje kontribuis kelkaj vizitoj de eksterlandaj esperantistoj. Unue, en oktobro 1977, okaze de sia ĉeesto en Havano pro aliaj laboroj, s-ro Nguyen Van Kinh, prezidanto de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (VPEA), esprimis deziron renkontiĝi kun kubaj esperantistoj. La renkontiĝon aranĝis oficialuloj de la kuba pacmovado, kiuj poste esprimis deziron, ke ankaŭ ilia organizaĵo komencu uzi Esperanton en siaj internaciaj kontaktoj. Poste, en la unuaj tagoj de 1978, en Havano troviĝis vizite ankaŭ ges-roj Matte, aktiva movada paro el Kanado. Ankaŭ ili renkontis grupon da lokaj esperantistoj. Fine, vizitanto el Portoriko rimarkis ion aparte atentindan lige al Esperanto en Kubo. Laŭ li, Esperanto tie servas kiel ĉefa komunikilo inter kubanoj kaj bulgaraj kaj ĉeĥo-slovakaj teknikistoj, kiuj laboras en Kubo. Por tiuj el

la teknikistoj, kiuj restadas pli longe en Kubo, Esperanto servas kiel ponto por la akiro de la hispana lingvo. Kubaj esperantistoj mem ligas la favorigon de la klimato por Esperanto al la Monda Junulara Festivalo, kiu fine de julio ĉi-jare venigos al Kubo ĉ. 16 000 gejunulojn el la tuta mondo. Laŭ iuj informoj, oni intencas uzi ankaŭ Esperanton dum la Festivalo. Tiucele oni en Havano nun instruas la lingvon al 60 gejunuloj, kiuj do servos kiel interpretistoj dum la Festivalo. Krome, en la fino de 1977 la nacia radio elsendis tuthoran programon pri Esperanto kaj ĝia signifo.



Vigligaj vizitoj en Kubo: Lokaj esperantistoj en Havano kun s-ro Nguyen Van Kinh (meze de la maldekstra foto) kaj ges-roj Matte (dua kaj tria de maldekstre, sur la dekstra foto).

Pri "fotografo"

LEGANTOJ de ĉi tiu revuo (januaro 1977) ricevis varmajn bondezirojn de la personoj, kiuj produktas la revuon (v. la rubrikon "Vi trovos" en la menciita numero). Inter tiuj homoj troviĝas "kunlaborantoj, kompostistoj, enpaĝiganto, fotografo, presisto, leganto de presprovaĵoj, redaktoro". Kiu el la cititaj nomoj ne estas ĝusta el lingva vidpunkto, kvankam ofte renkontata eĉ en vortaroj (v. *Grand dictionnaire Espéranto-français* de G. Waringhien kaj *Concise Esperanto and English Dictionary* de J.C. Wells)? Temas pri la vorto **fotografo**. Sed, ni traktu mallonge ankaŭ la aliajn vortojn el la supra citaĵo.

La vortoj **kunlaboranto**, **enpaĝiganto** kaj **leganto** estas formitaj el radikoj + **-ant**, sufikso de la aktiva prezenco participo, kiu en substantiva formo signifas personon, kiu plenumas agon.

En **kompostisto** kaj **presisto** la sufikso **-ist** aldonita al verba radikoj esprimas, ke la persono daŭre aŭ ĉefe okupiĝas pri la afero difinita de la radikoj.

Redaktoro estas sinonimo de redaktisto, kaj kvankam ĝia radikoj estas **redaktor-**, plua analizo montras, ke **-or** estas pseŭdosufikso kaj funkcias kiel vera agant-sufikso en la nacilingvaj etimoj de vortoj kiel redaktoro, aktoro, direktoro, gubernatoro, ktp.

Restas **fotografo** kiun oni povas analizi laŭ la Schwartz-a "etimologia metodo" jene: **fotografo = foto + grafo = grafo de foto!**¹ Tamen, tia ŝerca traktado certe ne ricevos la aprobon de la komisiitoj de la Lingva Servo de UEA (vidu artikolon sur p. 4 de la sama numero de *Esperanto*).

Laŭ *PIV* **fotografo** devenas de la verba radikoj **fotograf/i**. Sekve **fotografo** aŭ **fotografado** devas esti la ago aŭ arto fari **fotografadojn**, kaj la persono, kiu faras ilin estas **fotografanto** aŭ **fotografisto**². La uzo de la formo **fotografo** kun la signifo "persono, kiu fotografas" implicas, 1) ke ekzistas ankaŭ substantiva radikoj **fotograf/o**, aŭ 2) ke **fotograf-** estas hibrida radikoj, parte verba, parte substantiva! La substantiva uzo sendube rezultas el nacilingva influo: kp. en la franca **photographe**, germana **Photograph** aŭ **Fotograf**, hispana kaj portugala **fotógrafo**, itala **fotografo**, rumana kaj slavaj lingvoj **fotograf**. Sed tiu senbezona komplikado estas nur balasto en Esperanto; unu radikoj sufiĉas por logike pluformi la aliajn vortojn. Nu, leviĝas la demando: ĉu la radikoj estu verba aŭ substantiva? La plimulto de la eŭropaj lingvoj subtenas la vastan internaciecon de **fotografo**; fakte ne estas unu lingvo laŭ

mia scio, kiu havas vorton kun la sufikso **-ist**, do oni povas argumenti, ke **fotografisto** tute ne estas internacia formo. Tamen, ĝi estas regule pluformita laŭ maniero, kiu karakterizas la vortformadon en Esperanto. Cetere, la verba radikoj havas la apogon de grava fonto, verko de Zamenhof mem. En § 32 de la *Ekzercaro* troviĝas la frazo: "La fotografisto fotografis min, kaj mi sendis mian fotografadon al mia patro."

La scienca sufikso **-graf** devenas de la helena verbo **graphein** (skribi) kaj pro sia polisemia naturo ĝi okazigas problemojn ankaŭ rilate aliajn vortojn en Esperanto. Laŭ *PIV* **-graf** signifas 1) la praktikanton de arto aŭ tekniko: geografo, tipografo, koreografo; 2) — kiam ne povas temi pri persono — la koncernan aparaton: telegrafo, hektografo, kronografo. Sed *PIV* preteratentas aliajn signifojn de la plurfaceta **-graf**. Ĝi signifas ankaŭ 3) la rezulton, produkton aŭ objekton de la koncerna arto aŭ tekniko: epigrafo, holografo, aŭtografo; 4) kiel verbo, pritrakti arton aŭ teknikon: fotografi, daktilografi, litografi; 5) en la substantiva formo **-grafio**, ion verkitan aŭ priskribitan, kiel sciencobranĉon: monografio, stratigrafio, oceanografio.

La malsimetrioj de la formado de vortoj por la nomoj de sciencoj kaj iliaj praktikantoj, aparatoj kaj produktoj, rezultoj aŭ studobjektoj rezultas el la plureco de formoj en diversaj naciaj lingvoj. Esperanto heredis tiun ĉi kaŭson aplikante la 15an regulon de la fundamenta gramatiko. Espereble suplemento de tiu regulo estos ellaborita en la ne tro fora estonteco, por ke niaj leksikografoj kaj fakuloj havu konkretajn gvidliniojn por la esperantigo de la tiel nomataj internaciaj vortoj. Dume, la ŝercemuloj povas amuziĝi en Esperanto vortludante per **agrafo**, **margrafo** kaj ĉiuj aliaj loĝantoj de ilia graflando.

Bernard Golden

Japana fondaĵo

EN OKTOBRO 1972 la japana registaro starigis Japanan Fondaĵon, kiu nun servas kiel la ĉefa institucio por kulturaj rilatoj inter Japanio kaj eksterlando. Al ĝia agado apartenas la interŝanĝo de sciencistoj, la plivastigo de japanlingva instruado en aliaj landoj kaj la organizado de ekspozicioj pri la japana kulturo. Ekde sia establiĝo, la Japana Fondaĵo rimarkinde laboris por forigi la impreson, ĝis antaŭ nelonge ekzistintan, ke Japanio postrestas rilate sinprezenton al la ekstera mondo. Ĝia aktivado sendube konsistigas kontraŭpezon al la troe dominanta rolo de Eŭropo kaj Usono en la internacia kultura interŝanĝo.

Konsiderante tiun ĉi signifon de la Japana Fondaĵo, ni trovas bonvena la fakton, ke ĝi per esperantlingva broŝuro — *La Japana Fondaĵo* — donas koncizan superrigardon pri siaj celoj kaj ĝisnunaj atingoj. La 44-paĝa, ilustrita broŝuro estas ricevebla ĉe: Japana Fondaĵo, Daito Building, 3-7-1 Kasumigaseki, Chiyoda-ku, Tokio 100, Japanio.

U.L.

¹ En sia amuza poemo "La stranga aventuro de Grafo Dormanski", Raymond Schwartz priskribas parazitan nobelon, kies sola vivocelo estis "kuŝi en la lito", do li estas "litografo".

² Vidu en *Plena ilustrita vortaro* la artikolvorton **fotograf/i** (p. 311) kaj ankaŭ la klarigon pri la scienca sufikso **-graf** (p. 352).

Industriigo de la kosma spaco

Kiel ĉiuj homaj faroj, kiuj ne tuj produktas kvantigeblan rezulton, kosmonaŭtikaj entreprenoj ofte provokas polemikojn, kiuj esence turniĝas ĉirkaŭ la senco mem de la spac-veturoj kaj -esploroj. Aliflanke, kelkaj lastatempaj kosmaj incidentoj denove starigis la harojn de multaj skeptikuloj, precipe en la ekster-sciencaj, ĝeneralaj homamasoj. Tio estas la kaŭzoj, ke en nia revuo aperas la sekva artikolo, kiu klopodas emfazi la neceson kaj eblecojn de ekonomia uzo de la kosma spaco.

REVOJ PRI ELMIGRO de la homaro en la kosman spacon estas tiel malnovaj kiel la sciencofikcio mem, kaj de longa tempo verkistoj fantaziumas pri daŭre loĝataj, memstaraj stacioj, bazoj aŭ kolonioj en la spaco, ĉu en ĉirkaŭteraj orbitoj, ĉu sur la Luno, ĉu sur aliaj astroj. Antaŭ nelonge pli seriozaj sciencistoj kaj teknikistoj ekokupis sin pri la afero, pli kaj pli ofte pravigante altkostajn spacprojektojn per ties kontribuo al la solvo de multaj ĉiutagaj surteraj problemoj. Tiel, multaj iliaj konceptoj estas bazitaj sur la sugesto, ke spackolonioj estu la solvo de la troloĝateco de nia Tero.

Sed troloĝateco apenaŭ plu minacas la industriajn naciojn, kiom, kontraŭe, ĝi minacas multajn evoluantajn landojn, kaj tial la ebleco elmigri en la spacon ne respondas al demografia aŭ socia bezono de tiu parto de la mondo, kiu devus ekentrepreni kaj ekfinanci la koloniigon de la spaco. Kvankam, do, kosma koloniigo evidente ne taŭgas kiel komenca celo de kaj stimulo por spacprogramoj, ekloĝo de homoj en la spaco ŝajnas neevitebla en la pli malproksima estonteco; sekve, esplori la alternativojn kaj prezenti la diversajn elektelecojn apartenas al niaj nuntempaj ŝuldoj al la estontaj generacioj.


Ni troviĝas ne nur ĉe la sojlo de novaj, grandegaj teknikaj evoluoj, sed ankaŭ vid-al-vide al kreskantaj krizoj de nia surtera socio. Maksimuma elutiligo de nia teknika kaj scienca potencialo helpas tial la homaron ĝustatempe preventi antaŭvideblajn problemojn kaj minimumigi la riskon je ne jam rekonitaj krizoj. La laŭstupa planado de spacprogramoj, precipe en internacia kunlaboro, devas pro tio respondi la bezonojn de la homaro je mallonga periodo, samtempe kreante solidan fundamenton de teknikaj kapabloj kaj etikaj konsideroj, por ke elektoplena pli fora estonteco malfermiĝu antaŭ ni. Nur en tio troviĝus pravigo de la spacprogramoj de la nuna generacio.

Tridimensiigi nian mondon

Nia hodiaŭa socio, tiel en la industriaj kiel en la industriigantaj landoj, alfrontas kolosajn problemojn. Tamen, la plej premaj estas evidente la vivkondiĉoj en la evoluantaj nacioj de la mondo. Konfrontitaj kun


rapide kreskanta loĝantaro aŭ jama troloĝateco, ili submetiĝas al sociaj ŝanĝoj multe pli drastaj ol iam ajn okazintaj en la nun evoluinta parto de la mondo. La suma kresko de la evoluantaj nacioj rezultigos unumiliardan pliiĝon de la monda loĝantaro dum la venontaj 20-25 jaroj, surbaze de la hodiaŭa kreskoritmo.

Intensa kaj vasta, tutmonda industriigo — por certigi universale pli altan vivnivelon al la antaŭvidita monda loĝantaro post unu generacio — kaŭzas jam gravajn



Lanĉo de la eŭropa satelito HEOS-A2 en Kalifornio (Usono)

Komplika spac-
teknologio kun
limigitaj kapabloj:
"Symphonie",
franc-germana
komuniksatelito,
kiu servas i.a. por
la transsendo
de edukaj tele-
vidaj programoj al
kelkaj afrikaj
landoj.



zorgojn pro la konsumado de energio kaj krudaj materialoj, elmeto de rubaĵoj kaj malpuraĵoj kaj produktado de nedezirata kromvarmo. Ĉio ĉi kondukas al la konvinko, ke en limigita mondo ankaŭ la kreskeblecoj estas limigitaj kaj ke la nura alternativo en tia mondo prezentiĝas kiel neceso organiziĝi en la malabundo.

La rolo de la kosma spaco en tio devos esti: malfermi la esence dudimensian, "platan" mondon kun ĝiaj limigitaj provizoj, energio kaj surfaco, forigante tiujn limigojn ne nur per kreo de novaj produktoj kaj servoj, sed ankaŭ per deviigo de energi- kaj polucintensaj elementoj de sur la Tero al la kosma spaco, kie abundas la energiprovizoj kaj kie ekzistas preskaŭ senfina rubaĵujo (almenaŭ por disradia kromvarmon). La esencaj bezonoj sentataj de granda plimulto de la homaro (70%) estas industriaj disvolvo kaj diversigo, laborigo de la loĝantaro, stabiligo de la naskoj, agrikultura evoluigo kaj nutrado, kampara kaj urba evoluigoj kaj universaligo de san- kaj eduk-servoj. Krome, la industriaj nacioj jam frontas la problemaron de elĉerpiĝo de energio kaj krudaj materialoj, media malpuriĝo kaj ekonomiaj streĉitecoj, kiel daŭra inflacio ktp. La t.n. spaca industriigo devos kontribui al solvo de ĉiuj ĉi problemoj, tiel nacie kiel internacie.

Ŝtupoj

Vastigo de la biosfero, tiel ke ĝi enhavu la dimension de la kosma spaco, donos aliron al praktike senfina provizo de materialoj kaj de energio; pro tio la gvidaj principoj de la spaca industriigo estas formuleblaj jene:

- ekspluati la haveblon de senfinaj energiprovizoj;
- ekspluati la bonegajn proprecojn de la kosma spaco

- por transsendo de energio kaj informoj ĝenerale;
- ekspluati la grandan geografian kovreblon el la kosmo;
- ekspluati la favoran medion (escepte la radiadozonojn).

La industriigo de la spaco enkondukos kelkajn novajn aspektojn, kiuj fariĝos karakterizaj por estontaj homaj agadoj en la kosmo:

- kunmetado de grandaj konstruaĵoj en la spaco;
- funkciigo de komplikaj sistemoj en la spaco;
- efektivigo de longdaŭraj restadoj en la spaco;
- praktikado de subten- kaj ripar-servoj fare de homoj en la spaco.

Dum la longperioda motivigo de la spaca industriigo estas la fizika, homara ekspansio en la kosmon — cele al travivo de la fora estonteco —, la mallongperiodaj celoj estas: havigi al ni energion el la spaco, fabriki vendeblajn produktojn ebligintajn pro la spaca medio, liveri elspacajn servojn, kiujn industrioj, publikaj servoj kaj la ĝenerala publiko estas pretaj pagi.

Aplikoj

Energio. La problemo pri kontentigo de la energibezono de la industria mondo atingos krizajn proporciojn dum la venontaj 25 jaroj. La elektra povkapacito de nura Usono antaŭvideble triobliĝos antaŭ la jaro 2000, postulante investojn de ĉirkaŭ mil miliardoj da dolaroj. Ne ekzistas klare videbla fonto de energio por kontentigi ĉi tiun kreskon: nafto, natura gaso kaj normala nuklea tekniko konsumas neanstataŭigeblajn riĉaĵojn; nuklea fuzio estas necerta procezo kaj ĝia kosto nekonata; surtere generata sunenergio ŝajnas neefika pro la problemoj ligitaj al konservado kaj stokado de la tiel akirita energio.

Sen la spaca industriigo la perspektivoj ĝis 2000 limiĝas al karbo kaj al la t.n. bredantaj nukleaj reakto-

roj, kiuj cetere bezonas pliajn esploralaborojn. Aldona problemo estas la alta kosto de surtera transsendo de elektra povo, kiu ekzemple en Usono necesigas pli ol 400 000 mejlojn da alttensiaj kabloj kaj 11 000 kvadratmejlajn da okupita spaco. La avantaĝoj de la spaca industriigo tial povos esti:

- kreo de nova teknologio aplikebla al surteraj generado kaj/aŭ transsendo de elektra povo;
- starigo de reflektiloj en la spaco por pasiva relajsado tra la spaco de elektra povo de povstacioj al konsumentoj;
- generado de povo en la spaco por transsendo al la Tero.

Tre signifaj povos esti la konsekvencoj de povo generata en la spaco el la energio de la Suno : por surteraj sunenergikolektiloj en ekzemple Arizono, la Suno estas "disponebla" nur dum 17% de la tagnokto, dum la meza tutusona disponeblo atingas nur 6%. Forigo de sunpaneloj el la medio de la tera atmosfero kaj ilia lokado en konvenan terorbiton donos 99%-an disponeblon de la sunradiado, limigita nur de kelkaj okazaj iroj de la paneloj tra la ombro de la Tero. Post tiela kolekto de la sunenergio fare de satelito(j) en tersinkrona orbito, elektro estos generata laŭ iu el la konvert-teknikoj hodiaŭ esplorataj : tiu de fotovoltaeca transigo (lumenergio) kaj tiu de suntermika transigo (varmenergio). Transsendo al la Tero aŭ al enspaca industribazo okazos post konverto de la rektkurenta (RK) elektro en radiofrekvencajn (RF) mikro-ondojn kaj direktado al ricev-antenoj. Atmosferaj perdoj de la mikro-onda energio ne superas 2-8% kaj tuta RK-RF-RK ĉeno estas ĉirkaŭ 58%-e efika.

Por ke sistemo de povgeneraj satelitoj estu ekonomie vivkapabla, konsiderinda kvanto da povo devos esti liverata, kio postulos tre vastajn kolektpanelojn. Por surtera elmeto de 10 gigavattoj, fotovoltaeca panelo kovrus areon de 129 kvadratkilometroj kaj havus mason de 34 000 metraj tunoj. Ĝia efektivigo kostus proksimume 50 miliardojn da dolaroj. Suntermika satelito postulus ne pli ol 70 kvadratkilometrojn, sed mason de 151 000 tunoj kaj 59 miliardojn da dolaroj por sia realigo. Tamen, se la povo generita de fotovoltaeca satelito estus vendata je 2,7 dolaraj cendoj por ĉiu kilovatt-horo, tia satelito donus jaran enspezon de 2 miliardoj da dolaroj, alivorte unu kvadratkilometro da kosma spaco redonus 15,5 milionojn da dolaroj ĉiujare.

Produktoj kaj servoj. Alia ekspluato de la unika spacmedio estos la fabrikado de neorganikaj biologiaj/farmaciaj materialoj. Nuntempe ni scias pri kvin bazaj tipoj de industriaj procezoj, kiuj postulas sengraviton medion por altigo de la kvalito, pli efika uzo de la krudaj materialoj, komerce signifa produkto-kvanto kaj malpli alta kosto : kreskigo de kristaloj, purigo kaj disigo de materialoj, miksprocezoj, solidigoj, procezoj en fluidaĵoj.

Ĉefkandidatoj el inter la neorganikaj komercaj materialoj farotaj en la spaco estas duonkonduktaj mate-

rialoj, kiel silikonaj aŭ galio-arsenidaj rubandoj, vapordeponitaj sunĉeloj kaj niobataj kristaloj por laseroj kaj komputilmemoroj. Ekzemple, la produktado de kristalsplitoj el cilindraj buloj en la gravita kampo de la Tero donas nur 37% da uzeblaj "vafloj", kiuj siavice donas 21% da malgrandegaj elektronikaj splitoj por la subtavoloj de integritaj cirkvitoj, tiel ke la suma efikeco de la surtera procezo estas 8%. Kontraŭe, la farado de duonkonduktaj produktoj en sengravitaj cirkonstancoj donos la splitojn senpere, preterpasante la vaflo-stadion, kiun ni bezonas surtere, kaj ebligos totalan efikecon de 35%.

Eĉ pli gravaj ol la produktado de duonkonduktantoj estos la kulturkreskigaj procezoj de biologiaj produktoj kiel pankreataj ĉeloj (insulino), pituitariaj ĉeloj, medolo, sangoĉeloj (limfocitoj kaj granulocitoj), spermoceloj kaj enzimoj. Biologiaĵoj produktotaj en la spaco inkluzivos ankaŭ la enzimon urokinazo, kiu malhelpas 50 000 mortokazojn jare en nura Usono pro trombozo, kaj eritropoezino por la traktado de renmisfunkcioj kaj anemio.


Publikaj servoj. La baza koncepto pri utiligo de la kosma spaco por la ĉiutaga vivo de la grandaj homamasoj videbliĝos el la enorbitigo de grandaj satelit-strukturoj por komunikado. Kontraŭe al la ĝisnunaj principoj de kiel eble plej simplaj, malpezaj kaj fidindaj satelitoj (pro ilia neatingebla kaj neripareblo), la pli facila aliro al la kosma spaco kaj tiea daŭra ĉesto de homoj ebligos la konstruon de pli grandaj kaj multe pli komplikaj satelitoj, kun postlaso de la simplaĵoj sur la Tero. Studoj jam indikis, ke en multaj aplikoj de informtranssendo minimumaj kostoj estos atingitaj per komplikigo de la orbita parto (satelitoj) kaj simpligo de la tera parto (riceviloj, ktp.). Pro la avantaĝa pozicio de satelitoj en tersinkronaj orbitoj¹, milionoj da teranoj povos esti servataj el unu aŭ malmultaj komplikaj satelitoj, kies totala kosto estos multe malpli alta ol tiu de reto de terminaloj, bezonataj por malpli kapablaj satelitoj.

En la sengravita medio de la spaco, la konstruadon kaj kunmetadon de grandegaj antenaj kaj reflektilaj strukturoj ne ĝenos la surtere konataj limigoj pro fleksiĝoj sub la propra pezo. Tipaj aktivaj multfas-kaj RF-aj kaj mikro-ondaj antenoj tial mezuros 70-200 metrojn laŭ la diametro kaj funkcios je pov-nivelo de 20-150 kilovattoj. Pasivaj reflektiloj por la relajsado de energio al la Tero povos atingi diametrojn de 300 ĝis 1 000 metroj. Kiel dirite antaŭe, energikolektiloj povos ampleksi kilometrojn longe kaj larĝe.

La novaj, preskaŭ senlimaj ŝancoj alportitaj de spac-komunikado pere de ĉi tiaj progresintaj sistemoj ebligos respondi la individuajn, ŝtatajn kaj industriajn bezonojn dum la venontaj 25 jaroj. Unusola 70 metrojn larĝa satelito, ekzemple, povus liveri al 2,5 milionoj da homoj dudirektajn voĉ- kaj inform-kanalojn por rice-

¹ Cirkla orbito kun 24-hora periodo en la ekvatora ebena de la tero, kiu al la tera observanto sub ĝi ŝajnas ne moviĝanta.

Kosma veturilo por multfoja uzo: La usona Spac-Volano, en kies malfermita holdo videblas la eŭropa spac-labo, kun disfaldita teleskopo.



viloj grandaj kiel poŝhorloĝo. Unu multifaska satelito kovranta la tutan Usonon povus relajsi 30% de la poŝto de tiu lando kaj kaŭzi jaran ŝparon de unu miliardo da dolaroj. Same perfektigus la jamaj satelitservoj al veterstacioj, navigado, aera transporto ktp.

Por ke ĉiuj ĉi longperiodaj celoj estu atingitaj, la spaca industriigo uzos la t.n. spac-konstrubazon en la fruaj 80-aj jaroj por a) disvolvi kaj pruvi la teknologian koncepton, b) konstrui, kunmeti kaj elprovi grandajn strukturojn en la spaco, kaj c) efektiviĝi la unuajn komunikistemojn per transigo de la pli komplikaj partoj de la Tero en la spacon.

La unua paŝo

La unua paŝo direkte al daŭra kaj ekonomia okupo de la spaco estis farita en la periodo 1969-70, kiam Usono decidis fini la Apolon-projekton (lunvojaĝoj) kaj komenci la efektivigon de novaj, reuzeblaj spac-

veturiloj, la Spac-Transportsistemo (STS). Ĝi konsistas el la Spacvolano, Spaclabo (spaclaboratorio) kaj la Supra Etaĝo, tiu ĉi lasta por enmeto de kargoj en altajn orbitojn neatingeblajn per la Volano. La komencaj flugoj de la Volano estos tre similaj al la hodiaŭaj operacioj kaj montros ĝian utiligon kiel loĝatan lanĉilon por la enorbitigo de kargoj ne tre diferencaj de tiuj, kiuj nuntempe lanĉiĝas per nereuzeblaj raketoj.

La ĉefaj avantaĝoj de la Volano estos ĝia reuzeblo (post vertikala lanĉo ĝi surteriĝos post ĉiu flugo en la spaco kiel normala aviadilo), la operacia fleksebleco, la favora lanĉmedio (multe malpli "kruda" lanĉo ol per nuntempa raketo) kaj la ĉeesto de homoj por limigitaj intervenoj. Meze en la 80-aj jaroj la Volano formos la spinon de la spacagadoj, lanĉante, interalie, la unuan Spac-stacion, al kiu ĝi donos poste loĝistikan subtenon. Tiel, la operacia uzado de STS plenumos la unuan paŝon al la spaca industriigo, t. e. ĝi

garantios facilan aliron de la homo en malaltajn orbitojn kaj ebligos pli malpli longdaŭrajn restadojn en la proksima kosma spaco, en preskaŭ normalaj labor-kondiĉoj.

La dua paŝo

La Spac-stacio, lanĉota per la Volano, prezentos la duan paŝon. Dum la unuaj studoj pri la Spac-stacio akcentis ĝian laboratorian rolon (koncepto videbla en la Spaclabo, kiel parto de STS), nuntempe estas klare, ke ĝia emfazota rolo estos tiu de Spac-Konstrubazo.

Tiu ĉi konstrubazo povos esti funkcia ĉirkaŭ la jaro 1984 kaj ebligos daŭran laboradon al komenca personaro de kvar ĝis ok homoj en malalta orbito. La bazo estos kunmetita de moduloj², suprenportitaj dum du ĝis kvar flugoj de la Volano.

Tipa utiligo de la Spac-Konstrubazo disvolviĝos laŭ jenaj linioj :

- Uzado kiel konstru-, subten- kaj loĝistika bazo en diversaj orbitoj, por la kunmetado kaj elprovado de grandaj strukturoj (antenoj por komuniksatelitoj, energikolektiloj kaj energisendiloj, farmaciaj laboratorioj, ktp.);
- funkciado kiel servejo, subtenejo kaj savocentro por interorbitaj veturiloj kaj por plulanĉotaj veturiloj, kiuj eventuale bezonas enspacan finkonstruon aŭ replenigon de karburadoj;
- funkciado kiel centro por subteni, rekonstrui aŭ ĝisdatigi aŭtomatajn satelitojn;
- formado de nukleo por krei centran servejon en la spaco per sinsekva aldono de pliaj spacveturiloj kaj komuniksystemoj.

La Volano mem havos du bazajn operaciajn modojn, nome la en- kaj el-orbitigon de kargoj kaj enorbitajn funkciojn. Kvankam ĝi signife subtenos la homajn konstruagadojn en la proksima spaco dum la fruaj 80-aj jaroj, ĝiaj kapabloj estos limigitaj de la havebla kvanto da elektra povo por enŝipa konsumo kaj manovroj. Tiu povkvanto, produktata de hidrogen-oksigenaj karburĉeloj, sumos 7 kilovattojn dum 30 tagoj. Krom tio, ke la menciita disponebla povo ne estas grandioza por la konstrutaskoj de la Volano, la bezonataj kriogenikaj rezervuoj okupos en la spaca ŝipo konsiderindan volumenon, kiun necesas subtrahi de la transportkapablo. Tial oni nuntempe pristudas la efektivigon de speciala 25-kilovatta "povmodulo", transportebla faldite en la holdo de la Volano kaj disfaldota en la fina orbito, kie ĝi liveros meze 25 kilovattojn el sunenergio. Tiu koncepto grande faciligos la planatajn longdaŭrajn konstruadojn de la Volano kaj eĉ ebligos la operaciadon de libere fluganta Spaclabo, malkonektita de sia patrina ŝipo, la Volano. El la aparta povmodulo Spaclabo ja

² Memstara konsistiga kaj ofte interŝanĝebla parto de sistemo, kiu plenumas difinitan grupon da funkcioj, kiel subsistemo de la tuto. Generale nomata laŭ sia ĉefa funkcio: pov-modulo (por generi elektran povon), komand-modulo (el kiu estas gvidata la tuta sistemo) ktp.



Ĉu la spektaklon sekvos efektiva kunlaboro: Kosmonaŭtoj A. Leonov (dekstre) kaj T. Stafford, kies spacveturiloj rendevuis en la kosmo la 17an de julio 1975. Vera kunlaboro en la kosmo ankoraŭ ne okazas inter Soveta Unio kaj Usono, kiuj tiurilate ankoraŭ restas du apartaj galaksioj.

havigos al si sufiĉan elektran povon por longdaŭraj, memstaraj sciencaj misioj.

Konklude

Ĉi-supre estas skizitaj, krudlinie, la antaŭvidataj paŝoj en homaj spacagadoj, t.e. la uzado de loĝataj spacveturiloj (kontraste al la senhoma kosmonaŭtiko, kiu okupiĝas ekskluzive pri neloĝataj, aŭtomataj satelitoj, sondiloj, ktp). Menciigis la rezigno pri la spektakla Apolona projekto en Usono, favore al pli racia kaj pli ekonomia uzado de la kosma spaco per la efektivigo de la Spac-Transportsistemo. Mi priskribis la gravegan rolon de la reuzebla Spacvolano, unuavice kiel potenca transportilo por la enorbitigo de pezaj kargoj, kaj dua-vice kiel patrina ŝipo por Spaclabo. Ĉiuj ĉi elementoj elkreskos fine al la Spac-Konstrubazo por ebligi la teknologiajn aplikojn, kiujn mi antaŭe revuis.

Kiel aludite, la fina sukceso de estontaj kosmaj entreprenoj multe dependas de pli grandskala internacia kunlaboro en tiu ĉi kampo. La usona kaj okcident-eŭropa spacindustrio jam estas firme interplektitaj en la Volan- kaj Spaclabo-programoj, dum la kombinitaj Apolon-Sojuzaj flugoj signis komencon de kosma kunlaboro inter Usono kaj Soveta Unio. Antaŭ nelonge subskribitaj kontraktoj pri komunaj uson-sovetaj Volan-Saljutaj operacioj aŭguras pluan firmiĝon de la tiom dezirata universaligo de la uzado de la kosma spaco, kiu fine konkretiĝos en la spaca industriigo.

Inĝ. Wim Jansen,
Eŭropa Spac-Agentejo

Du bonaj gramofondiskoj

Recenzas Geoffrey King (Britio):

Al vi de mi de Alberta Casey. La Jolla: Berta Records, 1977. Duflanka, stereofona disko. 33t/m, 30cm. FM 77031.

Tra l'mondo de Olivier Tzaut. La Chaux-de-Fonds: O. Tzaut, 1977. Duflanka, stereofona disko (aŭ kaseto). 33t/m, 30cm. OT 1935.

Jen du diskoj tre malsamaj laŭ stilo kaj enhavo. Unue Alberta Casey kun 17 kantoj, nacilingve tre konataj ("La vivo en roz", "La Mar", "Ĝis la revido Roma" ktp.), tradukitaj de diversaj talentuloj sed ĉefe S. Docal. S-ino Casey havas sekuran kantoteknikon kaj memfide kantas; tio estas jam pozitivaĵo. Tia programo plaĉus en klubvespero kaj ankaŭ kiel ripete aŭdata gramofondisko verŝajne kontentigos, ĉar la kantistino bone regas la leĝeran stilon de la kantoj.

Nur tri kantoj ŝajnas miselektitaj: Estas stile tro fremdaj la "Lulkanto" de Brahms kaj la sola popolkanto ("La bosko fraksena"), dum "Estu sur tero pac'" simple ne estas bona kanto. "Ĝis la revido Roma" estas tre mallongigita; kelkaj kantoj estas retradukitaj el anglaj tradukoj; en "La sekreta amo" la vorto **tuj** fariĝas **dusilaba** (tu-i). Tiuj estas malgrandaj mankoj en disko ĝenerale plezuriga. Ni laŭdu ankaŭ la kapablan pianistinon. Entute do sufiĉe sukcesa disko, kaj ankaŭ teknike tre bona.

La 12 popolkantoj en prezento de Olivier Tzaut distingiĝas per variaj akompanoj fare de profesinivelaj muzikistoj. Oni aŭdas ne nur kantadon sed ankaŭ plaĉajn interludojn. Efektive en ĉi tiu escepte bona disko ĉio estas je profesia nivelo: la kantado, akompano, muzikaj aranĝoj kaj la tradukoj de C. Piron. En estas kantoj judaj, ciganaj, meksikaj, usonaj, perua kaj slovaka (ĉu vere s-ro Piron konas tiom da lingvoj?).

Se vi ankoraŭ NE pagis vian abonoŝon por 1978, vi riskas ne ricevi la aprilan numeron de la revuo!?

Olivier Tzaut havas belan kaj fortan voĉon, kaj modele senakcentan prononcon. Sed kiu li estas? La kovrilo tute ne havas biografiajn informojn pri li.

Ĉiam plaĉas en gramofondisko trovi, ke iu pensis pri la konvena ordo de la programo. Ĉi tie la gajaj kantoj kaj la sentimentalaj bone alternas. Inter ili la plej atentokapta kanto estas ĝuste la lasta, "Elimeleh". Malpli sukcesaj estas la du usonaj kantoj (eble s-ro Tzaut malpli kutimas tiun stilon?). Pleje plaĉas la tri ciganaj kaj precipe la tri judaj kantoj. Sume: bonega disko.

Mendu ĉe UEA: *Al vi de mi* 18,00 gld., *Tra l'mondo* 28,80 gld. (por Nederlando 21,24, respektive 33,98 gld.), plus sendokostoj 10%.




Paroli pri arboj estas krimo

Recenzas Giulio Cappa (Italio):

Trigroŝa romano de Bertolt Brecht (1898-1956). El la germana trad. Karl Schulze. Leipzig/Gerlingen: Edition Leipzig/Bleicher Verlag, 1977. 374p. 20cm. Bind. ISBN 3 921097 34 7.

Laŭ Bertolt Brecht, arto ne estas plu romantika intuicio, kiu subite disŝiras la grizan vualon de la ĉiutaga vivo. "La moderna disdivido de la laboro transformis, rilate al pluraj gravaj flankoj, la kvaliton de la krea elemento. La krea ago iĝis kolektiva krea procezo (...), tiel ke la origina izolita elpenŝaĵo perdis sian gravecon". Tiajn principojn Brecht elstare uzis en la teatro, arto en kiu plene pruviĝis lia renoviga talento. Konata estas lia koncepto de "eposa" teatro, laŭ kiu ĉiuj surscenaj elementoj, de vorto ĝis gesto, estas zorge kunmetitaj por komuniki al la publiko "neneŭtralan" sintenon rilate al la drama okazaĵo. Kulmino de la unua periodo en la ellaboro de tiu koncepto estis ĝuste la vaste konata *Trigroŝa opero* (unue surscenigita en 1928), frukto de kunlaboro kun Kurt Weill (1900-1950), unu el la plej atentindaj muzikistoj en nia jarcento. En 1933 Brecht estis devigita ekziliĝi el Germanio. El ĉi tiu trudita meditperiodo fontis riĉiĝo de lia teorio, nome la koncepto de "fremdigo". Temas pri prezentado de bone konata fakto aŭ procezo el tute nova aspekto. Elekstera observado de ĝi ebligas la ekkomprenon de ĝiaj esenco kaj funkciado. La *Trigroŝa romano*, aperinta en 1934, baziĝas ankaŭ sur tiu verka rimedo. Brecht reiris al la amuzaj kaj alegoriaj aventuroj de Polly Peachum kaj Macheath por rakonti al ni, en la atentokapta

stilo de aventura romano, parabolon pri la negoca vivo en la moderna socio. Ĉio okazas en duonfikcia Londono de la unuaj jaroj de nia jarcento, dum la milito inter britaj soldatoj kaj buroj en la suda Afriko. La famaj kantoj, kiuj en la opero elvokis la etosojn de la verkoj de John Gay kaj François Villon, restas ĉi tie nur por doni, de tempo al tempo, la takton al la disvolviĝo de la okazaĵoj. Polly ne plu estas nur la rava enamiginta knabino kaj Macheath ne plu estas nur la brava krimulo, simbolo de la malgajnontaj malgrandaj entreprenistoj. Ŝajnas, ke ili ambaŭ, en la romano, profitis la spertojn akiritajn en la opero: Polly eklernis la metion esti edzino kaj pli libere mastrumi sian plezuron. Macheath lernis la tutan moralinstruon de la *Trigroŝa opero*, ke eblas pli sukcese ludi laŭ la reguloj, ol opone al ili. Li gajnos, finfine, ĉi-foje sen la interveno de rajdanta kuriero.



Bertolt Brecht revoluciigis la teatran arton: Ĉu ni komencas modernigi nian guston pri tradukendaj verkoj? Ĉu post Brecht sekvos Kafka, Camus, Babelj, Borges, ...?

La fakto, ke la sola finverkita romano de Brecht nun legeblas en Esperanto, estas taksenda kiel grava riĝigo de nia literaturo. La verko estas majstre konceptita kaj pli ol unu el la herooj atingas plenan verŝajnecon, konservante tamen sian simbolan rolon. La graveco de la traduko de d-ro Karl Schulze des pli elstaras, se ni konsideras la ĝeneralan valoron de la aŭtoro en la kadro de la evoluo de artaj konceptoj en nia jarcento. Bertolt Brecht unue konstatis disfalon de valoroj en la moderna socio kaj mankon de elirvojo laŭ la tradiciaj metodoj. Sed baldaŭ nova, konstrua klopodo korektis la komencan emon al parodio kaj al senespera ironio. Lia bezono trovi solvon ne falis en plian distran aŭ transcendan fuĝan elturniĝon, sed strebigis lin al konstruado de elirvojo nova. Li estis la granda poeto, laŭ kiu, "paroli pri arboj estas preskaŭ krimo, ĉar tio implicas silenton pri tro da masakroj".

Mendu ĉe UEA: 31,80 (por Nederlando 33,07) gld., plus sendokostoj 10%.

Infana libraro

Recenzas Silvia kaj Wouter Pilger (Nederlando):

Grete kaj Jep de K. Hermansen kaj E. Jensen. El la dana trad. G. Riisberg. Aabyhøj, DEF, 1975. 40p. Ilus. 20cm. Mimeo. ISBN 87 85020 869. Prezo: 2,70 gld.

Temas fakte pri du apartaj rakontoj, unu pri Jep kaj familio, la alia pri Grete kaj ŝiaj pupoj. La rakontoj neniel interrilatas. Bona, facila lingvaĵo. Temoj interesaj por 4–7-jaraj infanoj. Simplaj sed taŭgaj nigrablankaj ilustraĵoj. Silvia mem kolorigis ilin.

Latva fabelareto. Tradukis B. Najbaro. Eldonis la tradukinto, 1975. 20p. Ilus. 21cm. Mimeo. Prezo: 2,40 gld.

Interesaj fabeloj en flua lingvaĵo. Tre bele multobligita libreto. Nigrablankaj ilustraĵoj laŭ originaloj koloraj, bedaŭrinde. Por pli aĝaj infanoj, sed ankaŭ por plenkreskuloj.

Malgrandaj plantidgardantoj de Gu Juzeng k.a. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1974. 24p. Kolorilus. 20cm. 88-Es-119P. Prezo: 1,20 gld.

Bele kolore ilustrita. Lingvaĵo ne taŭga por la aĝgrupo kiun interesus la rakonto (4 - 8?): unuflanke pro tro komplika gramatiko, aliflanke pro lingvaj sekvoj de socikulturaj diferencoj. Rakonto ne tiom plaĉa: pri knabeto, kiu metas branĉetojn en la bekon de anseroj, ĉar ili formangas plantidojn. Tamen interesa, se oni ne legas ĝin nur kiel skribite.

Saĝa kapto de granda huzo de Du Vej. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1974. 36p. Kolorilus. 20cm. 88-Es-120P. Prezo: 1,20 gld.

Ankaŭ ĝi estas bele ilustrita, kolore. Lingvaĵo pli uzebla ol tiu ĉe la antaŭa titolo (v. ĉi-supre). Por iom pli aĝaj infanoj (6–10-jaraj). En malmultaj paĝoj sufiĉe da aventuro: du infanoj en boateto batalas kontraŭ granda fiŝo kaj, kompreneble, ili gajnas.

Utila argumentado

Recenzas W.A. Verloren van Themaat (Nederlando):

Faktoj kaj teorioj kontraŭ mitoj kaj antaŭjuĝoj — Esperanto aŭ Interlingua? de Edo Bernasconi. La Chaux-de-Fonds: Kultura Centro Esperantista, 1977. 163p. 30cm. Studoj 9. Mimeo.

Jen verko kiun ni jam delonge bezonis: scienca defendo de Esperanto kontraŭ la planlingvo kiu nun prezentiĝas ĝia plej grava konkuranto: Interlingua. Ĝis nun la plej bona libro por tiu celo estis *Planlingvaj problemoj* de Gilbert¹, sed ĝi, kvankam parolanta iom pri Interlingua,

¹ La studo *Planlingvaj problemoj* de W. Gilbert estis dum pluraj jaroj nehavebla pro elĉerpiĝo, sed ĝi represiĝis pasintjare kaj estas aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA kontraŭ 10,50 gld.

havas la malavantaĝon, ke ĝi pritraktas ĉefe Occidental, kiu nun pasis sian kulminopunkton. Ĝenerale, Bernasconi montriĝas tute kvalifikita por la batalo eĉ kontraŭ la plej spertaj defendantoj de Interlingua, kiel Ric Berger². Li montras scipovi fari sciencon laboron, kio almenaŭ en la homsciencoj konsistas ne en voli elpensi ĉion el sia propra kapo, sed legi minimume la plej gravan parton de ĉio koncernanta la temon, por surbaze de tio esti originala eble en kelkaj rimarkoj. La libro³ de Bernasconi estas multe pli profunda ol tiu de Gilbert kaj analizas ankaŭ la filozofian fonon de Interlingua, la Whorf'an lingvistikan relativismon kaj Platonan/Goethe-an filozofion, surbaze precipe de la verkaro de Gode, la ĉefaŭtoro de Interlingua. Citante multajn freŝdatajn sciencajn rezultojn li montras, ke la filozofia bazo de Interlingua nun estas science malpravigita. En

2 Vidu recenzon pri lia verko *Esperanto o Interlingua* (prezo ĉe la Libroservo de UEA: 12,30 gld.) en nia revuo de januaro 1977, p. 33

3 Vidu recenzon pri la franclingva resume de ĉi tiu libro — *Esperanto et Interlingua* (ĉe la Libroservo de UEA, 4,80 gld.) — en nia numero de oktobro 1977, p. 172.

la lingvistika parto de sia libro Bernasconi estas malpli originala ol en la filozofia parto, kaj malpli profunda ol Gilbert. Li troigas la dependecon de la kritiko pri Esperanto — fare de Interlingua-anoj — de la "filozofio" de Interlingua; li preteratentas, ke kelkajn trajtojn kritikatajn de Interlingua-anoj kaŭzis ne la "filozofio" de Esperanto, malsama al tiu de Interlingua, sed simple la lingvistika malsperteco de Zamenhof. Ekz. Ric Berger en *La construction d'une langue internationale moderne* (1967) prave kritikas la afikson **-ig**, ĉar ĝi troviĝas nur en kelkaj germanaj formaĵoj kaj aliaj afiksoj por la sama funkcio estas multe pli oftaj en la etnaj lingvoj. Tiaj kritikoj cetere pravigas ne planlingvon tute malsambazan al Esperanto, sed planlingvon sambazan al Esperanto diferencantan de ĝi en kelkaj detaloj. La lingvaĵo ne estas perfekta; troviĝas i.a. kelkaj eraroj koncerne la akuzativon. Resume: libro leginda por ĉiu kiu volas vere science studi Esperanton kaj aliajn planlingvojn, precipe Interlinguan.

Mendu ĉe UEA: 27,90 (por Nederlando 29,02) gld., plus sendokostoj 10%.

Laste aperis...

Cent ĝojkantoj (1957), Marjorie Boulton (1924-). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1977 (fotorepreso). 48p. 18cm. Frua originala kolekto de la elstara poetino. Prezo: 6,90 gld.

Dek jaroj de PIF 1967-1977. Red. Zlatko Tišljarić k.a. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1977. 53p. Ilus. 24cm. Dulingva (serbokroata/Esperanta). Memorkajero de Pupteatra Internacia Festivalo, kun deko da artikoloj. Prezo: 11,40 gld.

En frua majmateno; Kelkaj perloj el la mezepoka nederlanda poezio (1968). Kolektis kaj el la nederlanda tradukis Wouter Pilger. Lelystad: Vulpo, 1977 (2a reviziita eldono). 16p. Ilus. 15cm. ISBN 90 70074 02 8. Prezo: 2,10 gld.

Esperanto and international language problems; A research bibliography (1967), Humphrey Tonkin (1939-). Washington: Esperantic Studies Foundation, Inc., 1977 (4-a reviziita eldono). 3 + 45p. 21cm. Eseforma bibliografio pri la monda lingvo-problemo; la koncepto de konstruita lingvo; kaj la Internacia Lingvo Esperanto el vidpunktoj lingvistika, socia, literatura kaj sociologia. Kun indekso de aŭtoroj. Prezo: 3,60 gld.

Esperantologiaj kajeroj 3, Géza Bárczi (1894-1975) k.a. Redaktis Éva Soós kaj Beata Ehmann. Budapest: Universitato Eötvös Loránd (Filologiscienca Fakultato), 1977. 375p. Mimeo. 24cm. Memolibro pri la eminenta lingvisto kaj esperantisto Géza Bárczi, konsistanta grandparte el liaj propraj verkoj: tradukoj (i.a. de sep scenoj el *La tragedio de la homo* de Madách), artikoloj, recenzoj ktp. Kelkaj pecoj aperas ankaŭ en la hungara. Prezo: 17,70 gld.

Estona soveta poezio. Elektis kaj el la estona trad. Hilda Dresen (1896-). Tallinn: Eesti Raamat, 1977. 203p. Fotoj. 17cm. Tridek ses poetoj reprezentigas en ĉi tiu antologio per verkoj el la jaroj 1940-1970. Prezo: 7,50 gld.



Évkönyve '78. Budapest: Magyar Eszperantó Szövetség, 1978. 240p. Ilus. 19cm. HU-ISSN 0133-669X. Jarlibro, kun hungare verkitaj artikoloj kaj el Esperanto tradukitaj noveloj kaj poemoj, de la nacilingva revuo de Hungara Esperanto-Asocio *Világ és Nyelv* (Mondo kaj Lingvo).

Granda kaldrono, La, John Francis (1924-). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1978. 592p. 21cm. ISBN 90 6336 001 0. Originala romano, en kiu mozaike interplektiĝas la vivoj en skota familio dum la unua kaj la dua mondmilitoj. Prezo: 42,00 gld.

Industria e cultura. N-ro 30 de la revuo *Strutture ambientali*. Rimini: Centro internazionale ricerche sulle strutture ambientali "Pio Manzù", septembro 1976. 93p. Ilus. 24cm. Itallingva artikolaro kun kontribuoj de C. Minnaja, pri Esperanto kaj du- aŭ tri-lingva edukado (la artikolon sekvas simpozio samtema); T. Carlevaro, pri interlingvistika kunlaboro; kaj R. Corsetti, pri lingvo-politika revolucio en la komunikado internacia. Prezo: 20,10 gld.

Kvindeka UK en Tokio 1965, La. Kaseto. 60 min. Salutparoladoj kaj festparolado. Prezo: 9,00 gld.

Noktoj, S. Sire. Savennes: La aŭtoro, 1977 (ne indikita). 40p. Ilus. 22cm. Alegoria bildstria rakonto. Prezo: 3,60 gld.

Novaj ĉinstilaj pentraĵoj. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1977. 33cm. 84J.Es-382P. Kvindek koloraj pentraĵoj, sur apartaj folioj, kun titoloj en la ĉina kaj Esperanto. En koverto. Kun ĉina kaj Esperanta titollistoj. Prezo: 9,00 gld.

Strukturo kaj evoluo de astronomiaj objektoj laŭ plasmofizikaj principoj. Parto 1-a: Suno, Manuel Halvelik. Borgerhout: La aŭtoro, 1978. 77p. Ilus. 29cm. Senpage havebla de la aŭtoro, Manuel Halvelik, Gebr. Blommestraat 41, B-2200 Borgerhout, Belgio.

Turisma Esperanto-Kalendaro 1978. Bydgoszcz: Monda Turismo/Turisma Servo de TEJO, 1978. 40p. 14cm. Mimeo. Ricevebla kontraŭ du internaciaj respondkuponoj de Centro de Turismo de PEA, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la minimuman mendosumon de 15,— guldonoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas minimume 3,— gld.

Ne nur en la Tria Mondo

Mi legis kun ega intereso la intervjuon kun d-ro Saheb-Zamani kaj la artikolon "Irana leciono". Tamen, ne nur en la Tria Mondo homoj studadas fremdajn lingvojn por lerni ion pri ekonomiko aŭ sciencoj, sed ankaŭ en Eŭropo. Kial en Belgio ni eklernu la anglan, la germanan,...? Ĉu nur por viziti Anglion, respektive Germanion? Ĉu nur por legi Milton, resp. Goethe? Tute ne! Propraj spertoj certigas min, ke multaj komencantoj forlasas la "movadon", kiam ili ekkonscias, ke Esperanto ne utilas por fakaj celoj.

G. Pirlot, Belgio

Ili neniam aŭdis pri Esperanto

Kun granda intereso, mia edzino kaj mi legis kaj surbendigis por Brita Asocio de Blindaj Esperantistoj la intervjuon kun d-ro Saheb-Zamani. Ĝi certe estas unu el la plej interesaj artikoloj, kiuj iam ajn aperis en la revuo. Persone, speciale interesis min, ke d-ro Saheb-Zamani prelegis ankaŭ al pakistanaj instruistoj. Jam dum dek jaroj mi laboras kun pakistanaj laboristoj..., sed informi ilin pri Esperanto montriĝis malfacile, ĉar en sia hejmlando ili neniam aŭdis pri ĝi.

B. Najbaro, Britio

Pensiga ekzemplo

Gratulon pro la artikolo "Irana leciono". Jes! Ni urĝe bezonas malkaran bultenon por komencantoj. Tio ekzistas por aliaj lingvoj (facilaj, modernaj legaĵoj kun, piede, lingvaj klarigoj). La irana ekzemplo estas vere pensiga por la tuta Movado.

A. Frangeul, Francio

Kial sarkasmo?

La letero de s-ro Tuinder (novembro 1977, p.190) malplaĉas pro kelkaj sarkasmaj esprimoj: "kia grandega honoro!", "tiu grava eldonaĵo". Ŝajnas al mi, ke la reguloj pri la Delegita Reto estis rompigitaj ankaŭ de s-ro Tuinder, kiu povis simple resendi la leteron. Cetere, ankaŭ mi devis kelkfoje solvi similajn demandojn (filatelo, numismatiko), sed — sen problemoj.

K. Sterke, Aŭstrio

Plimultigi fakajn periodaĵojn

En la novembra n-ro de *Esperanto* Cathy Schulze pledas, ke la esperantistoj eldonu nur unu revuon, kaj anstataŭ la nunaj fakaj periodaĵoj estu fakaj rubrikoj ekz. por pedagogio, sciencoj, medicino, literaturo ktp. Mi havas kontraŭan opinion. Literaturo kaj prilingvaj artikoloj povas interesi ĉiun esperantiston, sed fakaj artikoloj ĝenerale nur esperantistojn el la koncernaj fakoj kaj tre malmultajn aliajn.

Krom la menciitaj fakaj informiloj (pedagogia, scienca, medicina), aperas ankaŭ astronomia, ornitologia, demo-

grafia, muzikista, turisma, kampadista, naturamika, skolta, biblia kaj pluraj religiaj periodaĵoj. Se anstataŭ tiuj kaj pluraj aliaj fakaj periodaĵoj aperus rubrikoj en *Esperanto*, ĝi fariĝus vere impona laŭ amplekso, sed ankaŭ tro multekosta, kiun preskaŭ neniuj abonantoj. Krome, la legantoj de la nunaj fakaj periodaĵoj ne estus kontentaj, ĉar anstataŭ tuta revuo ili havus nur rubrikon. Unusola multifaceta revuo montrus nur nian malfortecon, do la propaganda valoro ne altiĝus, sed male, malriĉiĝus. Ni devas fari tute aliajn klopodojn: pli-beliĝi, pliampleksigi kaj plimultigi la fakajn periodaĵojn.

A. Sekelj, Jugoslavio

Skribite "kato", legate "muso"

Instigita per la letero de B. Thaillet kaj sekva redakcia noto (*Esperanto* 11/77, p. 190), mi dezirus aldoni kelkajn proponojn pri la elparolo de nomoj personaj, familiaj kaj geografiaj. Oni povas kaj devas senĉese peni por ke la propraj nomoj iĝu "digesteblaj" kaj kiel eble plej kutimaj por la vasta internacia publiko, des pli ĉar senhalte aperas novaj nomoj sur la paĝoj de Esperantaj eldonaĵoj. Mi elpikas ĉi tie nur kelkajn personajn kaj familiajn nomojn el la Indekso 77, p. 218-220: Amoureux, Benczik, Chapellier, Houghton, Llech, Amadou-Mahtar M'Bow, Oyarzabal, Setälä, Stöp-Bowitz, Szczurek, Szerdahelyi, Humphrey R. Tonkin, Tuinder, Tyynelä, Waringhien, Włodarczyk, Zacho. Kiel prononci ĉi tiujn nomojn? *Esperanto* povus indiki interkrampe la proksimuman prononcon almenaŭ ĉe la unua mencio de la nefonetike skribitaj nomoj. Interesan kaj laŭdindan provon de proksimuma prononco faris jam W. Auld en *Esperanta antologio* (1958) kaj G. Waringhien en *Lingvo kaj vivo* (1959). Per malmulte da peno oni ŝparus senĉesan stumbladon de la internacia publiko super Nietzsche, Shakespeare aŭ Marseille kaj similaj komplikaj skribitaj "kato" kaj legataj "muso"! La demando pri la prononco de personaj nomoj pligraviĝas se oni konsideras ke ni hodiaŭ pli kaj pli deziras akceli ne nur la internaciajn sed ankaŭ interhomajn rilatojn.

Franjo Gruič, Jugoslavio

kontakto — por scii pli

La kvaronjara revuo de TEJO estas denove ĉe la sojlo de ĝisdatiĝo! Tio ja estas novaĵo kiam temas pri Kontakto. Tio tamen estas ankaŭ normalaĵo por revuo, kiu tiel ofte ŝanĝas siajn redaktorojn. Ŝanĝoj alportas freŝecon, kiu en la Movado ne abundas en enormaj kvantoj. Provu! Temas ja pri io neordinara, sed ĝi tamen ne estas venena. Gustumu! Kiel dirus la juna Ludoviko, "jam temp' esta'" por pagi la abonon por la jaro 1978. La sumeto, pagebla al ĉiu UEA-peranto, estas 16,50 (por Nederlando 17,16) gld.

BRAZILO:

BRATEG por Marília



Lastatempe ni jam foje atentigis la legantojn, ke la Movado nun spertas ian teatran ondon. Se juĝi laŭ la nombro de novaj teatraj trupoj, oni povus diri, ke fakte temas pri tuta "infekto" de teatreto. Karakterize estas, ke preskaŭ ĉiuj novaj teatraj grupoj (Hungario, Finnlando, Francio, Hispanio, Soveta Unio) estas junularaj. Ŝajnas, ke la plej nova grupo estas BRATEG (Brazila Teatra Esperanto-Grupo), kiu pozas, iom trance, sur la supra foto. La grupon gvidas Ciro Gomez, prezidanto de Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO). BRATEG ne nur fondiĝis sed ankaŭ ekdiligentis; ĝi preparas la teatraĵon "Lasta noktomanĝo" de Luiz Marinho, pri indiĝena temo. La nova grupo premiere sursceniĝos dum la Unua Latin-Amerika Kongreso de Esperanto, inter la 17a kaj 22a de julio ĉi-jare en Marília apud San-Paŭlo.

DISDONO de kvardek sep diplomoj al novaj kursfinintoj de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, landa asocio de UEA, en plena salonego de la Kolegio de Salesanoj, estis la kulmina programero de la Unua Renkontiĝo de Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO). La renkontiĝo malfermiĝis en la urbo Niteroi la 26an de januaro 1978, en la ĉeesto de la juna urbestro, d-ro Wellington Moreira Franco, kiu per entuziasmaj vortoj montris sian favoron al Esperanto.

Dum tri sinsekvaj tagoj, 70 gejunuloj de BEJO, el 11 urboj, debatis diversajn problemojn ligitajn al la ĉiam pli granda disvastiĝo de la Internacia Lingvo en Brazilo. La diskutoj ofte ligiĝis al la Unua Latin-Amerika Kongreso de Esperanto en Marília (julio ĉi-jare; v. la rubrikon "Kalendaro") kaj la 66a Universala Kongreso, planata por la jaro 1981 en la ĉefurbo Brazilio. BEJO interalie decidis aranĝi en Marília la 2an Muzik-Festivalon de Esperanto, en kies kadro oni eĉ elektos "belulinon 1978", de BEJO, kompreneble. La sporta programparto de la renkontiĝo en Niteroi enhavis futbalan konfrontiĝon inter la teamoj el Uberaba, Goiania kaj Niteroi.


Kio pleje impresas observanton dum la brazilaj Esperanto-kunvenoj estas seriozaj klopodoj uzi nur la Internacian Lingvon. En Niteroi, eĉ la laŭtvoĉa incitado de la favorata futbal-teamo okazis en Esperanto. Kaj, por eviti, ke la novuloj tamen esprimu sian futbalan vervon nacilingve, la organizantoj de la renkontiĝo aranĝis por ili rapid-kurson pri tiu temo.

La dua renkontiĝo de BEJO estas planata por la fino de februaro venontjare en la urbo Goiania kaj — laŭ la asertoj de la organizantoj (tie oni emas fanfaroni) — ĝi estos multe pli sukcesa ol ĉi tiu en Niteroi. G.G.

Kotizoj de IJK

EKDE la 1-a de marto kaj ĝis la fino de majo ĉi-jare, validas jenaj aliĝkotizoj por la 34a Internacia Junulara Kongreso en Veliko Tarnovo (Bulgario, inter la 22a kaj 29a de julio 1978: Aliĝantoj ne pli ol 20-jaraj pagas 172 guldenojn (68 bulg. levojn); 192 gld. (76 lv.) pagas tiuj, kiuj estas ne pli ol 25-jaraj; se oni estas en la aĝo de 26 ĝis inkluzive 32 jaroj, necesas pagi 212 gld. (84 lv.) kaj, fine, aliĝantoj pli ol 32-jaraj devas pagi 237 guldenojn (94 bulgarajn levojn). Individuaj membroj de TEJO/UEA, malpli ol 26-jaraj, ĝuas rabaton de 12 gld. (5 lv.). Nur la aliĝantoj el: Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Germana DR, Hungario, Pollando, Soveta Unio kaj Rumanio rajtas pagi en levojn. Ĉiuj aliaj pagas al la CO aŭ landaj perantoj laŭ la guldena tarifo.

GLUMARKO de la ĉi-jara TEJO-Kongreso estas bela, dukolora (ora kaj verda), travidebla kaj — mendiinda. Dek glumarkoj kostas 2,25 (Ned. 2,66) gld., aŭfrankite. Mendu ĉe la Libro-servo de UEA. (3 irpk.)



Okdek ok respondoj al: Kien?

Marto

- 23 - 27 2a Junulara Internacia Festivalo, Jezolo, Italio (Itala Esperantista Junularo, Pf. 210, I-56100 Pisa)
- 24 - 27 62a Brita E-Kongreso, Morecambe (E. Lamb, 14 Arnside Crescent, Morecambe, Lanc. LA4 5PW, Britio)
- 24 - 27 Junulara Paska Renkontiĝo, Epe, Nederlando (NEJ, Coranthijnestr. 75, 9715 RG Groningen)
- 25 - 27 33a SAT-Amikara Kongreso, Rennes, Francio (C. Martin, "La Violais", F-35310 Mordelles)
- 31 Kotizoj de la Universala Kongreso altiĝas
- 31 Limdato de la Belartaj Konkursoj

Aprilo

- 01 - 07 Gajaj Tagoj, Sofia, Bulgario (Monda Turismo, Pf. 45, BG-1000 Sofia)
- 08 - 16 Printempa Semajno (ĉefe por infanoj), Gré-sillon, Baugé, Francio (F. Le Magadure, 23 rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont)
- 14 D-ro Zamenhof mortis en 1917
- 22 - 23 Sveda E-Kongreso, Uppsala (SEF aŭ Gläntstigen 4, S-752 56 Uppsala)
- 28 70a datreveno de la fondo de UEA en 1908
- 29-01/5 60a Kongreso de Belga E-Federacio, Loverval (E-klubo, 6 rue P. Pastur, B-6000 Charleroi)
- 29-01/5 Junulara Renkontiĝo, Zalaegerszeg, Hungario (TK de HEA, Pf. 263, H-8901 Zalaegerszeg)
- 29-01/5 14a Markola Kongreso, Folkestone, Britio (A. Marmenout, Helmweg 7, B-8300 Knokke-Heist 1, Belgio)
- 29-13/5 Printempa E-feriado, Zakopane, Pollando (Monda Turismo, Stieberg. 6/22, A-1150 Wien, Aŭstrio)
- 30 Limdato por la Internacia Ekzameno
- 30-02/5 Renkontiĝo de la E-Junularo, Višegrad, Jugoslavio (Esperanto, Vase Pelagića 8/I, YU-71000 Sarajevo)

Majo

- 03 - 06 11a Tutlanda Kunloĝado, Yaizu, Japanio (K.K.K. de E-Domo, Sibuya-ku, Yoyogi-santjôme, 46-17, Sone-Build. 502, Tôkyô-to, 151 Japanio)
- 04 - 07 Nigra-Arbaraj Migradotagoj, Unterkirnach, FR Germanio (Kirchplatz 4, D-7731 Unterkirnach)


- 06 - 07 Kultura Semajnfino, Ĝenevo, Svislando (KCE, Postiers 27, CH-2300 La Chaux-de-Fonds)
- 12 - 16 Junulara Renkontiĝo, Augsburg, FR Germanio (Esperanto, Karl-Strauss-Str. 1, D-8700 Würzburg)
- 12 - 16 70a Franca Nacia Kongreso de Esperanto, Clermont-Ferrand (4bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris)
- 12 - 16 56a Germana E-Kongreso, Augsburg, FR Germanio (H. Schmid, Alte Reichsstr. 31F, Steppach, D-8901 Gemeinde Neusäss)
- 13 Konkurso de la E-Kanzono, Clermont-Ferrand, Francio (J.P. Boulet, 7 avenue du Forez, F-63800 Cournon d'Auvergne)
- 13 - 15 Kongreso de Mondcivitanoj, Roubaix, Francio (L. Bourdon, Pacodomo, 50 rue Dammartin, F-59100 Roubaix)
- 13 - 20 30a IFEF-Kongreso, Roma, Italio (Dopolavoro Ferroviario di Roma, Via Bari 22, I-00161 Roma)
- 20 Jarkunveno de LEEN, Zeist, Nederlando (M. A. v.d. Kooij-Waal, Escamplaan 164, 2547 GL Den Haag, Nederlando)
- 22 - 27 Ĉebalta E-Printempo, Mielno, Pollando (Juventur, Jagiellońska 12, PL-85 067 Bydgoszcz)
- 26 - 28 73a Kongreso de Skota E-Federacio, Alloa, Skotlando (A. Goodheir, 16 Woodlands Drive, Coatbridge, ML5 1LE)
- 26-06/6 kaj 31-13/6 Buslinio "Esperanto", Hungario-Pollando (BTK de HEA, Pf. 153, H-1443 Budapest)
- 27-01/6 Internacia Teatra Renkontiĝo, Gdańsk, Pollando (Juventur, Jagiellońska 12, PL-85 067 Bydgoszcz)



Bulgario ĉi-jare estas la ĉefa celo de la movada turismo kaj ĝi povas proponi al la vizitantoj grandan elekton de aranĝoj kaj pejzaĝoj: Pamporovo en la montaro Rodopi.

Junio

- 01 - 04 Migrado "Tra montoj kaj valoj", Bulgario (Monda Turismo, Pf. 45, BG-1000 Sofia)
- 01 - 04 Internacia E-Renkonto, Bydgoszcz, Pollando (Juventur, adreso supre)
- 02 - 16 kaj 16 - 30 Nigramara E-Feriado, Nesebar, Bulgario (BEA, Pf. 30, Smoljan)
- 03 - 04 Trilanda Renkontiĝo (Nederlando-Belgio-Germanio), Aachen, FR Germanio (P. Firmenich, Jahnstr. 5, D-5190 Stolberg)
- 03 - 04 Semajnfino por infanoj kaj geknaboj, La Chaux-de-Fonds, Svislando (Svisa E-Junularo, 18 Verger Rond, CH-2000 Neuchâtel)
- 03 - 10 Migradtagoj, Edlach, Aŭstrio (Monda Turismo, Stieberg. 6/22, A-1150 Wien)
- 04 - 07 Etnografia Renkonto, Toruń, Pollando (Juventur, Jagiellońska 12, PL-85 067 Bydgoszcz)
- 05-11, 12-18, 19-25 kaj 26-02/7 Buslinio "Esperanto", Pollando-Hungario-Ĉeĥoslovakio (Juventur, Jagiellońska 12, PL-85 067 Bydgoszcz)
- 10 - 11 TANEF-Migrado, Rielig/Fluelen, Svislando (M. de Sassi, Nordstr. 123, CH-8037 Zürich)
- 10 - 20 Buslinio "Esperanto", Hungario-Pollando (Juventur, adreso supre)
- 12 - 17 Internacia Studsemajno, Ylitornio, Finnlando (Internacia Studcentro, SF-17300 Vääksy)
- 17-27 kaj 24-04/7 Buslinio "Esperanto", Hungario-Pollando (BTK de HEA, Pf. 153, H-1443 Budapest)
- 22 - 29 Feriado por Popollernejanoj, Znin, Pollando (Juventur, adreso supre)
- 24-07/7 11a Pionira Internacia Tendaro, Zánka, Hungario (HEA, Pf. 2, H-7601 Pécs)



Turisma "malkovro" de Bulgario estigis en tiu lando tre vastan kaj ekonomie porenkan turisman industrion por tre diversaj gustoj kaj poŝoj: Nigramara feriejo "Albena".

25-16/7 Internacia Laborkampado, Mezötúr, Hungario (Müvelődési Központ, Petöfi u. 5., H-5400 Mezötúr)

29-06/7 Feriado por Popollernejanoj, Tuczno, Pollando (Juventur, adreso supre)

Julio

- 01-20 Kurso por E-Instruistoj, Bydgoszcz, Pollando (Juventur, adreso supre)
- 02 - 08 16a Somera E-Universitato, Gyula, Hungario (TIT-SEU, Pf. 73, H-5701 Gyula)
- 02 - 15 Somera E-Tendaro (por infanoj 10-15-jaraj), Lančov, Ĉeĥoslovakio (Loka grupo de ĈEA, CS-674-01 Třebíč)
- 02 - 23 Skolta Tendaro "AGORA", Wronczyn-Pobiedziska, Pollando (P.R. Janowczyk, Hibnera 6A/4, PL-60 224 Poznań)
- 02-26/8 Internacia Feria Altlernejo (semajnaj kursoj), La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, Postiers 27, CH-2300 La Chaux-de-Fonds)
- 03 - 04 Kongreso de KLEG, Kansajo, Japanio (Kansaja Ligo de E-Grupoj, Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka, Oosaka-hu, 561 Japanio)
- 03 - 09 Buslinio "Esperanto", Pollando-Ĉeĥoslovakio-Hungario (Juventur, adreso supre)
- 03 - 20 3a Skolta E-Tendaro, Aŭgustova Lagaro, Pollando (Kom. Chor. ZHP, 22 Lipca 7, PL-16 400 Suwałki)
- 03 - 22 Kulturaj aranĝoj de Grésillon, Baugé, Francio (Kastelo Grésillon, F-49150 Baugé)
- 06 - 13 Feriado por Mezlernejanoj, Swiecie, Pollando (Juventur, adreso supre)
- 08 - 16 Internacia Studsemajno, Vääksy, Finnlando (Internacia Studcentro, SF-17300 Vääksy)
- 09 - 22 Somera E-Lernejo, Košcke Hamre, Ĉeĥoslovakio (M. Zvara, Leninovo Nabr. 29, CS-05 801 Poprad)
- 10 Virina Renkontiĝo, Budapest, Hungario (HEA, Pf. 193, H-1368 Budapest)
- 13 - 20 Feriado por Mezlernejanoj, Janikowo, Pollando (Juventur, adreso supre)
- 14 - 16 27a Hungarlanda E-Kongreso, Budapest, Hungario (HEA, Pf. 153, H-1443 Budapest)
- 15 - 21 51a Kongreso de SAT, LECTOURE, Francio (OKK-Esperanto, F-32700 LECTOURE)
- 16 - 29 Somera E-Tendaro, Lančov, Ĉeĥoslovakio (Loka grupo de ĈEA, CS-674-01 Třebíč)
- 17 - 22 Latin-Amerika Kongreso de Esperanto, Marília, Brazilo (Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Caixa Postal 1887, BR-20000 Rio de Janeiro)
- 17 - 26 11a Internacia Renkontiĝo Naturamika, Abaliget, Hungario (TK de HEA, Pf.2, H-7601 Pécs)
- 21 - 25 26a Kongreso de ELNA, Milwaukee, Wisc., Usono (ELNA, Box 1129, El Cerrito, CA 94530)
- 22 - 23 20a Kongreso de Kanada E-Asocio, Milwaukee, Wisconsin, Usono (ELNA, Box 1129, El Cerrito, CA 94530)

- 22 - 29 Internacia E-Ralio de IEKA al Varna (IEKA, J. Guillaume, 66 de Grasse Village, F-78810 Feucherolles)
- 22 - 29 34a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, Veliko Tarnovo, Bulgario (LKK, Pf. 587, BG-1000 Sofia C)
- 23 - 29 Internaciaj FERIAJ E-Kursoj, Helsingør, Danlando (E. Langkilde, Ingemannsvej 18, DK-3000 Helsingør)
- 23-05/8 11a Internacia Pedagogia Renkontiĝo de FIMEM (RIDEF), Aarjang, Svedio (J. Marin, 9 rue Adrien Lejeune, F-93170 Bagnolet, Francio)
- 23-12/8 Kulturaj Aranĝoj de Grésillon, Baugé, Francio (Kastelo Grésillon, F-49150 Baugé)
- 26 Publikigo de la Unua Libro de Esperanto en 1887
- 29-05/8 63a Universala Kongreso de Esperanto, Varna, Bulgario
- 30-12/8 Somera E-Tendaro, Lančov, Ĉeĥoslovakio (Loka grupo de ĈEA, CS-674 01 Třebíč)

Aŭgusto

- 1 - 31 (?) Internacia Junulara Esperantista Laborbrigado, Jugoslavio (JEJA, V. Pelagića 8/I, YU-71000 Sarajevo)
- 06 - 12 2a Najbarlanda E-Renkontiĝo, Primošten, Jugoslavio (Kroatia E-Ligo, Amruševa 5, YU-41000 Zagreb)
- 06 - 27 4a Sesio de Someraj Universitataj Kursoj, Lieĝo, Belgio (SUK, Pf. 9, B-4000 Liège)
- 08 - 15 12a Internacia Konferenco de ILEI, Nowy Sacz, Pollando (ILEI, O. Olssen, Bantorget 3, S-222 29 Lund, Svedio)
- 12 - 15 Esperantaj seminario kaj kurso, Siga-gubernio, Japanio (KLEG, Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka, Oosaka-hu, 561 Japanio)
- 12 - 18 Turisma Semajno, Slovaka Paradizo, Ĉeĥoslovakio (M. Svara, Leninovo Nabr. 29, CS-058 01 Poprad)

La necesa kompletigo?

La membrostatistiko de UEA atentigas, ke preskaŭ tri mil legantoj de nia revuo ne nepre estas membroj de UEA. Strange! Homoj legas sed ne agas? La revuo eĉ povas plaĉi al vi, tamen, la unika eldonaĵo, pri kiu UEA prave fieras, nomiĝas "Jarlibro" (ĉ. 350p.). Vi eble ne vidis ĝin?! Ĝi ja venas nur al la membroj, kiuj ricevas ankaŭ "Katalogon de la Libroservo" (ĉ. 250p.), rajtas utiligi la delegitajn servojn, voĉdonas, ĝuas rabatojn ĉe aliĝoj al la Kongresoj ktp., ktp. Pro ĉio ĉi, la necesa kompletigo (por 22,00 gld. jare) nomiĝas:

Fariĝi membro de UEA!

- 13 - 2/9 Kulturaj Aranĝoj de Grésillon, Baugé, Francio (Kastelo Grésillon, F-49150 Baugé)
- 15 - 21 7a Varia Internacia Semajno, Budapeŝto, Hungario (TK de HEA, Pf. 153, H-1443 Budapeŝto)
- 15 - 29 Somera E-Lernejo, Władysławowo, Pollando (Juventur, adreso supre)
- 18 - 24 Mezlerneja Ripoztendaro, Szolnok, Hungario (HEA, Pf. 193, H-1368 Budapeŝto)
- 20 - 27 Turisma Feriado, Horni Plana, Ĉeĥoslovakio (Klubo "Jitex", CS-397 11 Pisek)
- 26-1/9 Intensaj E-Kursoj, Barlaston, Britio (Intensaj Esperanto-Kursoj, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DG)

REDAKCIA NOTO: Kiel kutime, ĉi tie aperas nur parto de la anoncitaj movadaj aranĝoj, tiuj, pri kiuj povus interesiĝi internacia publiko. Ni klopodos aperigi suplementon al ĉi tiu kalendaro en nia julia/aŭgusta numero.

DELEGITA RETO:

Malĝusta vojo

EN LA NOVEMBRO numero 1977, p.190, nia revuo aperigis leteron de s-ro J. Tuinder, fakdelegito en Heemskerk, Nederlando. S-ro Tuinder plendis pri "sinjorino el Ĉeĥoslovakio", kiu sendis al li poŝtmarkojn por vendo kaj transpago de la mono al svisa banko, kion li rifuzis fari. La ago de s-ro Tuinder estis tute konforma al la "Regularo pri la servo de informpeto al UEA-delegito" (v. en la Jarlibro 1977, p.71). Male, la ago de la "sinjorino el Ĉeĥoslovakio" estas nete kontraŭa al la menciita regularo.

Tamen, la aperigo de la letero de s-ro Tuinder provokis plurajn malfavorajn reagojn en Ĉeĥoslovakio, tiel pri la ago de la misuzinto de la Delegita Reto, kiel pri la brulstampo, kiun nia revuo donis al la afero per la publikigo. Oni petis nin "eĉe pripensi similenhavajn publikigproponojn, kiuj en la okuloj de legantoj facile povus mistrafi la celon". Ni efektive tre serioze pripensis la aferon, ĉar la letero de s-ro Tuinder, atinginta nin la 18an de januaro 1977, restis en tirkesto preskaŭ dek monatojn, malgraŭ tio, ke la rubriko "Leterkesto" intertempe aperis. Nian decidiĝon pri la publikigo influis la fakto, ke ĝenoj, similaj al tiu spertita de s-ro Tuinder, ne maloftas en la Movado. Eĉ la Centra Oficejo de UEA devas relative ofte trakti leterojn en kiuj oni proponas al ni aĉeti neuzitajn poŝtmarkojn, broditajn tablotukojn, nacilingvajn gramofondiskojn, librojn, memoraĵojn ktp. Ni imagas, tamen, ke plimulto de tiaj komercaj proponoj iras rekte al la adresoj de la delegitoj kaj fakdelegitoj.

La CO kaj tutcerte ankaŭ la delegitoj tre bone komprenas la transpagajn malfacilaĵojn, kiujn spertas niaj membroj en pluraj landoj. Tamen, misuzo de la Delegita Reto ne estas la ĝusta maniero superi tiujn problemojn.

MADELEINE HAUDEBINE

Honora Membro de UEA, s-ino Madeleine Foing-Haudebine (1898-1978), forpasis la 31an de januaro, post operacio en pariza hospitalo. Ŝi lernis Esperanton en 1932 kaj okupiĝis ekskluzive pri ĝi dum la resto de sia multrilate admirinda vivo.



Konatiĝinte kun la fama Cseh-metodo, en 1933, s-ino Haudebine restis fidela al ĝi kaj fariĝis unu el la plej konataj Cseh-metodaj instruistoj kaj ĝenerale unu el la plej persistaj laborantoj sur la pedagogia kampo en la movada historio dum la pasintaj kvin jardekoj. Ŝi instruis en Francio (1932/33 kaj poste), Nederlando (1933/35), Svedio (1935/38), Belgio (1938/40), Danlando (1948/49), Norvegio (1949/53), denove Danlando (1953/57). En 1958 ŝi vojaĝis al Hinda Unio, por instrui tie plenajn 16 jarojn, kun interrompo en 1965, kiam ŝi samcele vojaĝis al Japanio. Ŝia *Utila manlibro pri Hindujo* aperis en 1967. Ŝi ofte prelegvojaĝis. En pluraj Universalaj Kongresoj s-ino Haudebine gvidis Cseh-metodajn seminariojn; laste en Rejkjaviko.

PENKO PETROV

En Jambol, Bulgario, la 15an de januaro mortis Penko Petrov (1880-1978), doĵeno de Veterana Esperantista Klubo, kio signifas – la plej

malnova esperantisto en la mondo. Petrov lernis Esperanton en 1899, korespondis kun Zamenhof kaj multaj aliaj famaj pioniroj, estis delegito de UEA jam en 1911 kaj ankoraŭ en 1970, verkis multajn artikolojn pri Esperanto kaj tradukis literaturaĵojn, instruis la lingvon en mezlernejoj, partoprenis plurajn internaciajn E-kongresojn kaj estis plananta mallongan viziton al la ĉi-jara UK en Varna.

LAJOS LESZNAI

Fine de novembro en Budapeŝto forpasis d-ro Lajos Lesznai (1904-1977). Esperantisto ekde 1924, li kunlaboris en *Literatura mondo*, estis redaktanto de *Hungara vivo*, preleginto en Internacia Somera Universitato kaj kontribuanto al pluraj movadaj periodaĵoj, i.a. *Scienca revuo*, *Sciencaj komunikaĵoj* kaj tiu ĉi revuo, kies ĉefa muzika recenzanto li estis dum la lastaj jaroj. Kiel muzikologo, d-ro Lesznai estis internacie respektata fakulo pri Béla Bartók, pri kiu li verkis libron (1961), tradukitan ankaŭ en la anglan kaj germanan.

KARL OTTO SCHMIDT

Fine de la pasinta jaro en Reutlingen (FR Germ.) forpasis K.O. Schmidt (1904-1977), iam tre aktiva esperantisto, i.a. sekretario de Germana E-Asocio, eldoninto de kelkaj lerniloj tuj post la lasta mondmilito. Li abunde verkis en la germana kaj kun-aŭtoris *La manifesto de la paco*, kiu aperis ankaŭ en E-traduko (1975).



BRANKO RAJŠIĆ

La 11an de februaro forpasis en Zemun (Jugoslavio) Branko Rajšić (1900-1978). Li lernis Esperanton en 1922 kaj faris el ĝi sian ĉefan vivokupon. Kiel elstara lingva kompetentulo (membro de Jugoslavia Esperanto-Instituto ekde ties fondiĝo), li ofte kontrolis vortarojn kaj aliajn E-librojn antaŭ presigo. Kelkare li estis vicprezidanto de Jugoslavia E-Ligo, sed dum jardekoj li sekretario kaj animis en la loka societo, kie li gvidis sennombrajn kursojn kaj edukis plurajn movadajn generaciojn. Rajšić kunlaboris en *Konkordo*, *La suda stelo* kaj *Kajeroj*. En 1924 aperis brajle lia traduko de *Nia koro*; *Rakontoj por infanoj*; li postlasis ampleksan kronikon pri la loka Esperanto-movado. Rajšić estis membro kaj delegito de UEA dum pli ol duona jarcento.

Loke

Meksikio

- Unuafoje en Meksikio studento akiris la titolon de magistro per tezo pri Esperanto kaj interlingvistiko. Temas pri la tezo "Kelkaj aspektoj de la monda lingvo-problemo" de Marcelo J. Villareal, akceptita en majo 1977 ĉe la Universitato Monterrey, apud la usona landlimo. La temo estas esplorita el diversaj vidpunktoj kaj mag. Villareal i.a. komparas plurajn kandidatojn por la rolo

de mondlingvo kaj koncentriĝas je la latina kaj Esperanto.

Soveta Unio

- Ekde februaro ĉi-jare, 75 studentoj (unua studjaro) pri filologio sekvas devigan teorian kurson pri interlingvistiko en la Baŝkira Ŝtata Universitato. Dividitaj en tri grupojn, la studentoj frekventas ankaŭ praktikan kurson de Esperanto. Instruas s-ro Boris Kolker.

Japanio


• Malfrue por okupi sian lokon en la "Kalendaro" (aliloke en ĉi tiu numero), sed tamen lastmomente por eniri ĉi tiun rubrikon, atingis nin jena informo: La 65a Kongreso de Japanaj Esperantistoj okazos la 26an kaj 27an de aŭgusto 1978. La kongresejo estos la Fakultato de Literaturo kaj Scienco en la Universitato Nihon, en Misima, ĉ. 120km sudokcidente de Tokio. La ĉi-jara japana kongresurbo estas konata kiel "enirejo" de la pitoreska nacia parko Huzi-Hakone-Izu. Pliajn informojn bv. peti ĉe la organizanto: Japana Esperanto-Instituto, 14-2-2 Hongo, Bunkyo-ku, Tokio, 113 Japanio.

Belgio

• Tre aktiva Esperanto-Grupo de Verviers prezentigis en Radio Lieĝo per ampleksa programo la 17an de februaro. La elsendo okazis en tre konvenaj vesperaj horoj, en la kadro de la programo "Malferma radio-pordo". Same en la franca lingvo, la Belga Televido elsendis la 26an de februaro 10-minutan filmon pri la Esperanto-aktiveco en Lieĝo. Parolis ankaŭ d-ro Pol Denoël, prezidanto de la landa asocio kaj antaŭa estrarano de UEA. La filmo prezentigis en la kutima sabata rubriko pri kulturo kaj estas nur la unua el kelkaj planitaj elsendoj pri Esperanto.

Jugoslavio

• En Novi Sad, ĉefurbo de la nacie plej bunta jugoslavia provinco Vojvodino, meze de januaro okazis



• Aŭstralio: Malgraŭ la modernaj komunikiloj kaj aerpoŝtaj servoj, Aŭstralio malofte gastas sur niaj paĝoj. Oni simple ŝajne lernis vivi iom izole kaj ne kutimiĝis sendi al ni informojn. Tamen, jen la partoprenantaro de la 21a Aŭstralia Esperanto-Kongreso, okazinta komence de januaro. (La foton sendis E. Loozits).

ekspozicio pri Esperanto en granda industria entrepreno. La inaŭguron ĉeestis ankaŭ televida raportisto, kiu intervjuis plurajn aktivulojn de la regiona Esperanto-movado. En alia jugoslavia provinco, Makedonio, la 30an de januaro Televido Skopje, en sia albanlingva programo, prezentis 10-minutan intervjuon kun inĝ. Usni Zenoski, aŭtoro de prespreta Esperanta lernilo por la parolantoj de la albana lingvo.

Kanado

• Akademiano, d-ro William Solzbacher, parolis la 22an de januaro pri la temo "Esperanto klopodas rompi la lingvobarojn" en prestiĝa prelegserio de la Universitato de Windsor, Ontario.

Danlando

• Dum februaro ĉi-jare, f-ino Alicja Michiewicz, studentino de la Esperanto-fako en la Universitato ELTE en Budapeŝto, faris prelegvojaĝon pri Pollando en pluraj danaj urboj. Inter alie, ŝi prelegis en lernejoj, kiel ekz. en Næstved, kie antaŭ nelonge fondiĝis nova Esperanto-grupo. Ankaŭ la dana gazetaro favore raportis pri ĉi tiu utila vizito.



Terminologio

• En la Cirkulero TC 77/2, kiun la 29an de decembro pasintjare dissendis akademiano R. Eichholz, gvidanto de la Terminologia Centro de ISAE, aperas la rezultoj de la enketo pri la demando "Ĉu komputero, komputilo, komputoro, komputro aŭ kio?". El ĉ. 400 enketitoj respondis nur 79. Kvankam iom malfirme, la rezultoj ŝajnas preferi la esprimon "komputoro" por la uzo de fakuloj, sed tamen ne malrekomendi la terminon "komputilo" por la publiko.

Literaturo

• Post 42-jara interrompo, nun la Kataluna Kunordiga Komitato de Hispana Esperanto-Federacio anoncas revivigon de la iam fama literatura konkurso "Floraj Ludoj", lanĉita en la 5a Universala Kongreso en Barcelono (1909). La 18a konkurso Internaciaj Floraj Ludoj antaŭvidas



• Brazilo: Komence de februaro, s-ro Giuseppe Grattapaglia, ĉefdelegito de UEA, vizitis la urbon Marília, kie meze de julio okazos la Unua Latin-Amerika Kongreso de Esperanto, sub aŭspicio de UEA. Sur la foto (de maldekstre): s-ro W. Ferreira Martins, prez. de la organiza kongresa komitato, deputito Pinheiro, G. Grattapaglia, d-ro Theobaldo de Oliveira Lyrio, urbestro, kaj urbaj konsilistoj. La Kongreso ĝuas unikan subtenon de la urbaj kaj ŝtataj aŭtoritatoj.

poezian, prozan kaj tradukan (unu difinita kataluna teksto) branĉojn. La limdato estas la 30a de junio ĉi-jare. Pliajn informojn petu de: s-ro Gabriel Mora i Arana, str. Carrió 5, 4., Manresa (Barcelona), Hispanio.

Edukado

• Kiel vi povas legi en la rubriko "Kalendaro", aliloke en ĉi tiu numero de la revuo, fine de julio kaj komence de aŭgusto 1978, en Arjang, Svedio, okazos la 11a renkontiĝo de la edukista movado FIMEM, internacia instanco, kiu antaŭ du jaroj decidis uzi Esperanton kiel unu el siaj oficialaj laborlingvoj. Dum la renkontiĝo eblos ne nur sperti la t.n. Freinet-pedagogion sed ankaŭ helpi, ke la oficialigo de Esperanto pruvigu utila kaj funkcia decido.

Periodaĵoj

• Laŭ kelkaj lastatempaj numeroj, la konata periodaĵo *El popola Ĉinio* modifas sian redaktan politikon. Jam aperis pluraj artikoloj pri ne-politikaj, eĉ pri Esperantaj temoj. En la numero de februaro 1978, la revuo anoncas sian intencon prinoti novajn eldonaĵojn en la Internacia Lingvo kaj jam mallonge prezentas du ne-ĉinajn Esperanto-librojn.

Eldonaĵoj

• Sub la iom misgvida titolo *UEA kaj la neŭtraleco*, franca esperantisto, d-ro Georges Salan, publikigis 11-paĝan kajereton, kiu traktas (pli ĝuste: tuŝas) malmulte priatentitan temon: nome, la rilaton inter la "interna ideo" de Esperanto kaj la (parti)politika konvinko de unuopaj adeptoj de Esperanto.

Studoj

• En *ADFL Bulletin*, vol. 9, n-ro 2, novembro 1977, periodaĵo de la asocio de fremdlingvaj fakoj (Association of Departments of Foreign Languages) en la usonaj universitatoj, aperis ampleksa studo de d-ro H. Tonkin pri "Lingvo kaj la internacia kunteksto".

• S-ro François Lo Jacomo, juna agregaciulo pri matematiko kaj lingvistiko el Parizo, publikigis sian studon "La predikata adjekto en Esperanto" en la renoma franclingva periodaĵo *La linguistique* (vol. 13, n-ro 2/1977), revuo de la internacia societo de funkcia lingvistiko.

Persono

Asakaŭa

• Membro de Japana Esperanto-Instituto (JEI), s-ro Haruo Asakaŭa (sur la foto), volas utiligi Esperanton por internacie diskonigi sian muzikan verkon sub la titolo "Asakaŭa-



izado – muzika principo de relativeco por ĉiuj". Prezento de la nova projekto aperis (en Esperanto) en la februara numero de *La revuo orientata*, monata periodaĵo de JEI. S-ro

Asakaŭa (nask. en 1942) estas eminenta muzikisto, kiu unue studis pianon en Japanio kaj poste profundigis siajn sciojn i.a. pri la teorio de komponado, eduka muziko, popolmuziko kaj korus-direktado ĉe la ŝtataj konservatorioj en Moskvo, Leningrado, Varsovio kaj Budapeŝto (kvar jarojn). Li estas kontaktebla ĉe la adreso de JEI (v. sur la apuda paĝo sub "Japanio").

Wood

• Prof. d-ro Richard E. Wood, redaktoro de *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado*, vizitis en januaro ĉi-jare Portorikon, karib-maran aŭtonoman ŝtaton kun konstituciaj ligoj al Usono. Prof. Wood iris tien laŭ invito de portorikaj esperantistoj kaj grupo de lokaj intelektuloj, kiuj kreis fortan skolon de esplorado pri la rajtoj de hispanaj kaj alilingvaj kulturaj minoritatoj en usonaj teritorioj kaj en Usono mem. La vizito starigis utilan kontakton inter la intelektula grupo kaj lokaj esperantistoj. En junio ĉi-jare (v. sub "Kalendaro", p.61) prof. Wood estos la ĉefpreleganto en la Internacia Studsemaĵo en Ylitornio (Finnlando).

Vi ne trovos

Ne temas pri nova revua rubriko, simila al tiu dorse de la kovrila paĝo. Temas pri averto: Krom kelkaj mencioj kaj aludoj, vi ne trovos en ĉi tiu numero multon pri la 63a UK en Varna. Tamen, al ĝi jam aliĝis preskaŭ 2000 homoj al kiuj la Dua Oficiala Bulteno jam estas survoje. Nia aprila n-ro amplekse traktos la Kongreson kaj Bulgarion.

Oficiala informilo

Numero 514

ŜANĜOJ EN LA ĜENERALA REGULARO

Per skriba voĉdono, kiu finiĝis la 1-an de novembro 1977, la Komitato de UEA akceptis du ŝanĝojn en la Ĝenerala Regularo de UEA, kiujn proponis al ĝi la Komisiono pri la Ĝ.R., starigita en Rejkjaviko. Sekve de tiu voĉdono, necesas:

- en la artikolo 28(c) aldoni la vorton "nur", tiel ke legiĝu: "Kvin ĉefdelegitoj aŭ delegitoj rajtas proponi

nur unu kandidaton el inter la individuaj membroj de la Asocio;..." (Tio estas nur precizigo de dusencaĵo en la Regularo, konforme al ĝia tradicia interpretado);
- en la art. 28(a) forstreki la lastan frazon, tiel ke restas nur: "Je 250 ĉefdelegitoj kaj delegitoj laŭ la stato de la 31-a de decembro de la pasinta jaro estas elektata po unu Komitatano B." (La antaŭa teksto aldonis, ke "Ĉiu komencita ducentkvindeko rajtigas al plia Komitata-

no B", sed tio ne estis konforma al la art. 25(B) de la Statuto de UEA). Por la unua ŝanĝo voĉdonis 37 komitatanoj kaj 1 sin detenis. Por la dua ŝanĝo voĉdonis 32, kontraŭ 3, kaj 3 sin detenis.

DU GRAVAJ HEREDAĴOJ

Heredaĵo Ponti: Nia revuo de decembro 1976 (p. 210) aperigis nekrologon pri la forpaso de Dirk Mijndert Pot (1895-1976), iama oficisto de la CO de UEA, konata en la Movado kiel Dick Ponti. Baldaŭ post la sciigo pri la forpaso, al UEA venis informo, ke

tiu internacie konata Cseh-metoda instruisto heredigis al la Asocio kvinonon de sia havaĵo. Post longa proceduro, kiu inkluzivis vendon de loĝejo ktp., meze de februaro ĉi-jare al la poŝtkonto de UEA venis 27 604, 08 guldenoj, kiom fine sumis la UEA parto de la heredaĵo. Menciindas, ke plia movada instanco — la nederlanda "Esperanto en la instruado" — same heredas konsiderindan sumon.

Heredaĵo Weil: En majo pasintjare, en Munkeno (FR Germanio) forpasis dumviva membro de UEA s-ro Kurt Weil. En oktobro 1977 UEA ricevis

kiel testamentaĵon de s-ro Weil kolekton de poŝtmarkoj, precipe Esperantaj, kiu laŭ hodiaŭaj katalogaj prezoj valoras pli ol 2 000 guldenojn. Per sia testamento s-ro Weil ne nur finance helpis UEA, sed ankaŭ ebligis, ke la Biblioteko Hodler kompletigu sian kolekton de Esperantaj poŝtmarkoj kaj unuataĝaj kovertoj, al kiu nun mankas jam nur kelkaj eroj.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

FR GERMANIO: Lucia Rehse. JAP: Hidetoshi Iwamoto. NED: N.C. Kui-terman-van Goor.

La membraro de UEA en 1977

Lando	AM	IM	Sume
Albanio	-	1	1
Alĝerio	-	2	2
Antiloj Nederl.	-	1	1
Argentino	319	67	386
Aŭstralio	164	131	295
Aŭstrio	300	61	361
Belgio	500	154	654
Bolivio	-	1	1
Brazilo	709	258	967
Britio	864	367	1231
Bulgario	4100	84	4184
Cipro	-	1	1
Ĉeĥoslovakio	1650	135	1785
Ĉilio	-	2	2
Ĉinio	-	3	3
Danlando	400	126	526
Egiptio	-	7	7
Ekvadoro	-	1	1
Finnlando	366	243	609
Francio	659	549	1208
FR Germanio	1270	427	1697
Germana DR	500	19	519
Greklando	400	17	417
Hinda Unio	-	8	8
Hispanio	?	143	143
Hongkongo	-	2	2
Hungario	3100	122	3222
Indonezio	-	3	3
Irako	-	2	2
Irano	-	40	40
Irlando	?	9	9
Islando	?	34	34
Israelo	?	35	35
Italio	1379	242	1621
Japanio	1000	328	1328
Jemeno, DR	-	1	1
Jugoslavio	600	150	750
Kanado	170	101	271
Kenjo	-	1	1
Kolombio	-	16	16
Korea Respubl.	230	21	251
Kostariko	-	3	3

Lando	AM	IM	Sume
Kubo	-	15	15
Kuvajto	-	3	3
Laoso	-	1	1
Luksemburgo	51	16	67
Madagaskaro	-	5	5
Malajzio	-	1	1
Malto	-	1	1
Maroko	-	2	2
Maŭricio	-	3	3
Meksikio	-	19	19
Monako	-	1	1
Nederlando	381	417	798
Niĝerio	-	2	2
Norvegio	420	99	519
Nov-Gvineo	-	1	1
Nov-Zelando	113	73	186
Pakistano	-	1	1
Panamo	-	1	1
Peruo	-	16	16
Pollando	4150	111	4261
Portoriko	-	2	2
Portugalia	-	27	27
Rodezio	-	1	1
Rumanio	-	33	33
Senegalio	-	2	2
Singapuro	-	4	4
Sirio	-	1	1
Soveta Unio	-	75	75
Srilanko	-	2	2
Sud-Afriko	54	24	78
Sudano	-	1	1
Svedio	1276	486	1762
Svislando	200	186	386
Tajlando	-	2	2
Tunizio	-	1	1
Turkio	-	2	2
Urugvajo	-	3	3
Usono	327	515	842
Venezuleo	-	18	18
Vjetnamio	-	3	3
Zairio	25	5	30
83 landoj	25677	6099	31776

RESUMA DETALIGO

DE LA MEMBRO-STATISTIKO DE UEA POR 1976 KAJ 1977

Membro-kategorio	1976	1977
Membro-Jarlibro	683	906
Membro-Abonanto	4 066	3 882
Dumviva Membro	974	986
Honora Membro	21	18
Juna M-Jarlibro	31	109
Juna M-Abonanto	243	198
Individuaj Membroj	6 018	6 099
Asociaj Membroj	25 650	25 677
Membroj entute	31 668	31 776
Societo Zamenhof	220	243
Simplaj abonoj	151	203
Kolektivaj abonoj	1 424	2 628
Pagintoj entute	33 463	34 850

RIMARKOJ KAJ KLARIGOJ

Se oni rigardas la supran membro-statistikon el la sama angulo, kiel oni tion kutimis rigardi kaj mezuri dum la lastaj jardekoj, oni venas al la konkludo, ke la nombro de individuaj membroj restas stabila. Tamen, jam pasintjare ni atentigis, ke okazas strukturaj ŝanĝoj, kiujn necesas atenti ĉe ĉiuj komparoj inter la membraro en unuopaj jaroj. Tio unuavice koncernas la novan ne-membran kategorion de kolektivaj abonoj al la revuo *Esperanto*, kiu de 1976 al 1977 altiĝis je pli ol 1 200 abonantoj. Finance, tio estas konsiderinda plia enspezo. Cetere, tio komplementas la grandan kreskon en la kategorio Membro-Jarlibro. Finance signifa estas ankaŭ la kresko de la membronombro de Societo Zamenhof.

SOCIETO ZAMENHOF 1978

FRG: 35 Margarete Hiebel; 36 Margarete von Waldowski; 37 Walter von Waldowski; 38 Louis Beaucaire. US: 39 Joel Silverman. FRG: 40 Felix Epstein; 41 Wilhelm Th. Oeste; 42 Bruno Vogelmann. ARG: 43 Curt Julio Milkuschütz. AŬSTRAL: 44 L.V. Scott; 45 E.W. Woodruff. BRAZ: 46 Denisa A. Deslandes. DANL: 47 Ejnar Hansen; 48 J. Pedersen. KAN: 49 Dorothy Hawley; 50 Thomas M. Hess; 51 Olga du Temple; 52 W.G. du Temple. LUKS: 53 B.R. Moon. NOR: 54 Andrejs Armanis; 55 Margrete Landmark; 56 Olaf Maeland; 57 Olav Reiersøl. SVED: 58 M. Ahlström; 59 Ragnar Hjorth; 60 E. Schuldenfrei. US: 61 Richard S. Mull; 62 W.C. Nelson; 63 Bruce

Arne Sherwood; 64 Eug. H. Thompson jr. VENEZ: 65 Carlos Levay.

DONACIOJ 1977 (Gld)

ĝis la 31a de decembro

ELDONA FONDAĴO: Nederlando: Mondkomerca Eldonejo Esperantista 20,00. Sumo por 1977: 20,00.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: G. Pirlot 20,57. Nederlando: R. Moerbeek 50,00. Sumo por 1977: 1561,27.

FONDAĴO CANUTO: Nederlando: R. Moerbeek 55,00; H.C. Timmer 10,00. Svedio: Sam Owen Jansson 24,62. Usono: J.N. Mourello 16,24. Sumo por 1977: 6359,94.

FONDAĴO ENCIKLOPEDIO: Japanio: T. Huĝimoto 121,50. Sumo: 121,50.

ĜENERALA KASO: Britio: H. Davies 22,05. Francio: M. Bonafous 222,13; Dehan 1,45. FR Germanio: W. Barnickel 3,26; A. Bormann 6,50; A. Garcia 30,38; O. Mehler 3,26; I. Pahnhenrich 3,25; L. Rehse 27,12; E. Siegert 10,85; H. Spirat 2,16; H. Stahl 3,24. Kanado: D. Hawley 318,00; D. Henderson 2118,20. Nederlando: A. van der Heij 3,92; R. Moerbeek 45,00; W.J. van der Spoel 19,85; A. W. Treurniet 20,00; Y. Weidema 18,00. Svedio: Gustav Anderson 41,65. Sumo por 1977: 8372,11.

UNESKO-KAMPANJO: Norvegio: L. Anjer 220,34. Sumo por 1977: 6867,23.

Al ĉiuj donacintoj plej sinceran dankon!

UEA

ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

Respondo 17

(pri la demando v. nian februaran numeron, p. 39)

La aludita urbo estas Londono.

a. La unua kvarto de *The Tragicall Historie of Hamlet Prince of Denmarke* de William Shakespeare estis publikigita en Londono en 1603. En 1894, sep jarojn post la naskiĝo de Esperanto, d-ro L.L. Zamenhof aperigis sian versan tradukon de la ŝekspira dramo, *Hamleto, Reĝido de Danujo*. Moderna kaj pli fidela versio, *Hamleto, Princo de Danujo*, fare de L.N.M. Newell, angla esperantisto-verkisto, estis eldonita en 1964.

b. Parto de la mesaĝo, kiun d-ro Zamenhof registris la 12an de januaro 1904 sur vaksa cilindro por la Londona Esperanto-Klubo tekstas jene: "Antaŭ unu jaro nia afero estis ankoraŭ tre malmulte konata en via lando, kaj nun ni havas en via lando jam tre multe da varmegaj kaj sinceraj amikoj, ni havas diversajn klubojn de esperantistoj, ni havas konstantajn kursojn de Esperanto, ni havas belan gazeton Esperantan.

Preskaŭ ĉio estas la frukto de laborado de la klubo Londona, kiu povas esti fieraj je la rezultatoj de sia unujara penado. Al la noblaj kaj energiaj kondukantoj kaj laborantoj de la Londona Klubo Esperanta nia afero ŝuldas koran dankon."

c. Herbert F. Höveler (1859-1918), pli bone konata laŭ sia pseŭdonimo E. Ĉefeĉ, estis germandevena angla esperantisto, kiu elpensis la formon kaj celon de la ŝlosiloj. Tiuj malgrandformataj libretoj kun resumo de la gramatiko de Esperanto kaj la minimumaj radikoj bezonataj por ĉiutaga uzo nuntempe ekzistas en proksimume 40 lingvoj.

cheles (1833-1917), konata en artistaj kaj pacifistaj rondoj, prezidanto de la Londona Esperanto-Klubo kaj vicprezidanto de la Brita Esperanto-Asocio.

d. La 19an de aŭgusto 1907, la urbestro de Londono, Sir Vezey Strong, akceptis esperantistojn en la fama Guildhall (urbodomo). D-ro Zamenhof en sia prelego tuŝis du ĉeftemojn: 1) la proponoj pri plibonigoj en Esperanto kaj 2) la diferenco inter la ŝovinismo kaj la patriotismo.

e. Edmond Privat, post la 3a Universala Kongreso en Kembriĝo, iris labori en la londona eldonejo de William T. Stead, la redaktoro de la



ĉ. En aŭgusto 1907, post la 3a Universala Kongreso en Kembriĝo, Anglujo, d-ro Zamenhof kun sia edzino Klara iris al Londono. Tie ili pasigis kelkajn tagojn ĉe Felix Stone Mos-

konata revuo *Review of Reviews*, en kiu aperis ĉiumonate paĝo pri Esperanto. Stead estis la eldonisto ankaŭ de la unuaj Esperanto-lernolibroj kaj vortaroj en la angla lingvo.

f. La Esperanto-diservoj en Londono, kiuj komenciĝis en 1912, okazas la duan dimanĉon de ĉiu monato krom aŭgusto. Post pluraj transloĝigoj en diversaj preĝejoj, la diservoj lokiĝis en la Franca Protestanta Preĝejo en Soho en 1951. Antaŭ la formala estiĝo de tiuj diservoj, kristana rondo kunvenis en la hejmo de la fama brita esperantisto M.C. Butler, ekde 1909.

g. La Brita kaj Alilanda Biblia Societo eldonis en Londono en 1912 la Novan Testamenton de la Sankta Biblio tradukitan el la helena lingvo sub la gvido de anglikana pastoro, John Cyprian Rust (-1927). En 1926 aperis la Malnova Testamento tradukita el la hebrea originalo fare de d-ro L.L. Zamenhof.

ĝ. Ekde 1936, rezulte de provo ŝpari monon per transloko de la Centra Oficejo de UEA de Ĝenevo al Londono, ekzistis skismo en la Movado. Parto de UEA restis en Ĝenevo, dum nova organizaĵo, la Internacia Esperanto-Ligo (IEL), estis fondita kun sidejo en Britujo. Fine, en 1946-1947 la malnova UEA kaj IEL estis kunfanditaj por krei la reunuigitan UEA.

h. 1602 esperantistoj aliĝis al la 30a Universala Kongreso en Londono en 1938. En 1971 la 56a Universala Kongreso nombris 2071 personojn.

DEMANDO 18

(la respondo aperos en nia aprila numero)

Ĉi-monate la demando temas pri la agadoj de la polico en la historio de la Esperanto-movado kaj roloj de policistoj en la originala literaturo en Esperanto.

1. Kiu pioniro de la sveda Esperanto-movado, profesia ĵurnalisto, laboris kiel ĉefredaktoro de la gazeto de la nacia asocio de policistoj inter 1906 kaj 1920?

2. En kiu romano okazas kverelo sur pariza strato inter policisto kaj protektanto de publikulinoj, kaj la ĉefrolantino ponardas la policiston?

3. Kiu estas la juna esperantisto el okcidenteŭropa lando, kiu dum vojaĝo en kelkaj urboj de la rusa imperio en 1911 prezentis prelegon, kiu estis kontrolita de policisto, kiu komprenis Esperanton? La preleginto priskribis sian sperton jene: "...En Peterburgo la permeso por la prelego, petita jam de du monatoj, alvenis nur posttagmeze por la vespero kaj aro da bonvolaj samideanoj

devis disporti la kunvokilojn al la diversaj adresoj. Dum mi prelegis, grandunifforma policoficiro sidis dekstre de mi kaj atente sekvis ĉiun vorton."



4. En humura aŭtobiografia romano okazas sceneja prezentado de virino, kiu, ŝajnigante, ke ŝi havas telepatiajn povojn, parolas pri iu ŝtelisto en la urbo, kiu baldaŭ estos diskonigita. Poste ŝi ricevas peton de la polico nomi la krimulon, kion ŝi evidente ne povas fari. Pri kiu originala Esperanta romano temas?

5. En lando de la meza Eŭropo, polikapitano en 1913 malpermesis Esperanto-kurson por laboristoj, dirante, ke ĝi estas "ŝtelista lingvo". Pri tio poste debatis la landa parlamento. Kiu tie defendis Esperanton?

6. En novelo, verkita de tre populara Esperanta aŭtoro, polica kapitano Gabor Zentay estis vokita esplori la memmortigon de ĵurnalisto, kaj post kelkaj semajnoj ankaŭ li sammaniere finis sian vivon. Kiu novelo? Kiu verkisto?

7. Kiu en 1922 komencis redakti la dumonatan revuon *La policisto* kaj en 1924 eldonis *Oficiala Almanako de la Tutmonda Polica Ligo*?

8. En kiu filmo rolas kiel policistoj tri konataj francaj esperantistoj: Raymond Schwartz, Jean Thierry kaj Jack-André Rousseau?

9. En kiu lando estis eldonita de la Kriminala Oficejo de la Justic-Ministerio en 1939 libro klasifikita "strikte sekreta", kiu enhavas informojn pri arestitaj proletaj esperantistoj?

10. Policisto serĉas la kulpulon, kiu per ekzota afrika veneno kaŭzis la morton de revoluciema juna viro. Pri kiu krimromano temas?

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (1 int. resp. kup.). Pri la enhavo respondecas nur la anoncantoj mem.

Kiel eduki denaskan esperantiston?
Mi provas du infanojn esperantistigi. Mi sola parolas Esp. en mia hejmo. Viajn spertojn, konsilon atendas: So Gilsu, Sodemun P.O.-kesto 59, Seŭlo, Koreujo.

Naturistoj/Nudistoj! Aliĝu al INOE (Internacia Naturista Organizo Esperantista)! Bonvolu peti informojn ĉe: Helmut Welger, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio.

Serĉas kontakton kun kontraŭmortpunistoj; interŝanĝi ideojn, skribaĵojn. Skribu al ELA, P.O. Box 17627, Ft. Worth, Texas 76102, Usono.

La Asocio por la Enkonduko de Nova Biologia Nomenklatur, Hertendreef 12, B-2180 Kalmthout, Belgio, propagandas inter sciencistoj la uzon de Esperanto-terminaj sciencaj nomoj de bestoj kaj plantoj. Membroj en pli ol 30 landoj.

MONDCIVITANOJ adoptis Esperanton en sia kongreso (1977). Por plenumigi tiun decidon la minoritato de esperantistoj inter la Moncivitanoj ege kresku — Volpelière, 8, rue Rouget de Lisle, F-30000 Nîmes, Francio.

Memoru, ke la Centra Oficejo, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, daŭre akceptas ĉiaspecajn poŝtmarkojn. Ni petas vin konservi viajn uzitajn poŝtmarkojn kaj sendi ilin al la supra adreso. Tiel vi povas kontribui al la financa fortikigo de UEA.

Legantojn de presprovaĵoj por Esperantaj kaj franclingvaj tekstoj bezonas la CO de UEA. Kandidatu lingve kompetentaj personoj, prefere el landoj en poŝta proksimeco de Roterdamo. La laboro estas senpaga, sed oni ja senpage legas novajn eldonaĵojn antaŭ ties apero.

Vizitkartojn kun E-signo aŭ E-vortoj kolektas kaj interŝanĝas (po 10): S-ro von Blottnitz, Marcolaan 8, Florida-Glen 1710, Sud-Afriko.

Elĉerpitaj libroj?

Disponebblas binditaj fotokopioj de plurdeko da elĉerpitaj libroj. Petu apartan prezliston de la Libro servo de UEA.

La vervekiĝo de Budhismo

(63 paĝoj, 15 x 21 cm)
Verkis HIUGA-Yosinori,
tradukis NISIDA-Ryôya.

Mendu per unu respondkuponon ĉe: S-ro NISIDA-Ryôya, Saihōzi, Goken'yamati 7-2, Kisiwada-si, 596 Japanio. Poŝta ĝirkonto: Osaka 43925. (Pli ol 50 tagojn daŭras ekspedo al Eŭropo per la ŝippoŝto).

UNU ĈEMIZO — DU MODELOJ

KROKODILO

AMIKECO

Mendeblaj en kvar mezuroj (s,m,l,el) ĉe JELI, P.K. 22041 Tel Aviv, Israelo. Prezo inkl. sendokostojn: nur 12,— gld. Tio estas bona IN-VESTO — ankaŭ por viroj!

KSM

Se vi serĉas seriozajn korespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejoj), turnu vin al la Korespondanta Servo Mondskala de UEA. Adreso: KSM, 12, rue des Jacobins, F-63000 Clermont-Ferrand, Francio.

HELSINGÖR 1978

La Internaciaj FERIAJ Esperanto-Kursoj, la 46aj sinsekve, okazos de la 23a ĝis la 29a de julio en la Internacia Altlernejo de Helsingör, Danlando. Ni invitas vin veni por ĉeesti kaj ĝui neforgeseblajn tagojn en internacia rondo. Kaptu la okazon komenci aŭ perfektigi en la Internacia Lingvo. Programo senpage havebla ĉe:

S-ino Eva Langkilde
Ingemannsvej 18,
DK-3000 Helsingör, Danlando.

Subtenu la tutmondigon de Esperanto per donaco al la Fondaĵo Azio-Afriko ĉe la CO de UEA

Fondaĵo Azio-Afriko

La gaja forĝisto



La gaja forĝisto, humuraj poemoj de Hermann Schmid, Augsburg, 14,5x21,2 cm. broŝ. 24p. Prezo: 3,90 GM inkluzive la afrankon. Mendojn akceptas: Hermann Schmid, Seitzstr. 14, D-8900 Augsburg, FR Germanio. Bv. pagi per poŝtmandato. La aŭtoro ne celas altnivelan poezion, sed simplan spicon, vivan kaj humuran, en versa formo. La broŝuro kun trafaj ilustraĵoj de Josef Maria Ipfelkofer ne ignoras la bavaran medion, el kiu devenas la aŭtoro. Pri tio atestas la poemo "Inter la bavaroj".

Ĵus aperis

internacia diskutejo 4

instigoj por

nova monda ekonomi-ordo
kaj efika helpo al evoluigo

20 x 12 cm, 28p.

öS 54,—

al poŝtĝirkonto 7 503.218 Vieno, d-ro Josef Hartl, aŭ mendu ĉe UEA

Aliĝu al **Internacia Teatra Renkontiĝo**

(sub aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio)

en Pollando, inter la 19a de majo kaj la 4a de junio 1978.

Teatraj trupoj el Bulgario (**Anani Anev** kaj **Belka Beleva**), Finnlando, Francio (**TESPA**), Pollando (**Pola Esperanto-Teatro, Jadwiga Gibczyńska**), Soveta Unio (Leningrado) — ludos verkojn de Eugène Ionesco, Anton Ĉeĥov, Elin Pelin k.a.

Venos ankaŭ **Triksini la iluziisto** el Luksemburgo!

Kiel membro de la oficiala karavano de UEA/Juventur, vi veturos aŭtobuse el Berlino al Pollando la 19an de majo vespere, kaj partoprenos dum via restado en:

- Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno (kun ekskursoj, seminario pri **Sinjoro Tadeo**, dancvesperoj, apudstranda loĝado ktp.), 1978 05 20 - 27;
- Internacia Teatra Renkontiĝo en Gdansko (kun seminario pri Esperanto kiel internacia lingvo de la teatro), 1978 05 27 - 06 01;
- Internacia Esperanto-Renkonto en Bidgoŝo, 1978 06 01 - 04.

La kotizo, nuraj **450,00 guldenoj**, inkluzivas aŭtobusan veturigon de kaj al Berlino, kaj ĉiujn kostojn de transporto, loĝado kaj manĝoj. Ĉiuj karavananoj ricevos liberigon de la deviga monŝanĝo en Pollando. Nur kvardek lokoj haveblaj! Limdato: la 20a de aprilo 1978. **Aliĝu ĉe Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando**, kun indiko "Teatra Renkontiĝo" sur la pagilo.



SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ (4a sesio) **UNIVERSITATO DE LIEĜO (BELGIO)** **06 — 27 de aŭgusto 1978**

**SUK
78**

Petu pliajn informojn kaj aliĝilon ĉe:
SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ,
Boîte Postale 9,
B-4000 Liège X,
Belgio.

SEKCIO A: ASTRONOMIO

- 1-a semajno: H.M. Maitzen (Aŭstrio): Stela magnetismo
- 2-a semajno: H.M. Maitzen (Aŭstrio): La strukturo kaj dinamiko de nia galaksio
- 3-a semajno: H.M. Maitzen (Aŭstrio): Modernaj observoteknikoj en la astronomio

SEKCIO P: PSIKOLOGIO

- 1-a semajno: C. Piron (Svislando): Strukturiĝo de la personeco
- 2-a semajno: M. Landmark (Norvegio): Enkonduko en la socialan, emocian kaj intelektan evoluon
- 3-a semajno: J. Lieberman (Usono): Seksedukado kaj psikoterapio: integriĝo je mensa sanigo

SEKCIO IL: INTERNACIA LITERATURO

- 1-a semajno: V. Benczik (Hungario): Verkado kaj legado de beletra en fremda lingvo
- 2-a semajno: G. Silfer (Finnlando): Stilistiko kaj literatura kritiko
- 3-a semajno: G. Silfer (Finnlando): Sciencfikcio: internacia ĝenro por internacia lingvo

Ĉiu semajna kurso ampleksas 12 lekciojn de po 45 minutoj, kiuj okazas de lundo ĝis vendredo, ĉefe matene. Sabato estas dediĉita al ekzamenoj, ekskursoj, ktp. Studvizitoj estas antaŭviditaj.

Aliĝo: La horaro estas tiel aranĝita, ke eblas aliĝi al sekcio IL kaj samtempe al sekcio A aŭ al sekcio P. Krome, ĉiu kalendara semajno estas en si mem kompleta unuo. Oni do havas kvin aliĝeblecojn (sekcio A, sekcio P, sekcio IL, sekcioj A kaj IL, sekcioj P kaj IL) dum unu, du aŭ tri semajnoj.

Kromprogramo: Ekskursoj, vizitoj, film-vesperoj, sportado, kulturaj aranĝoj, perfektiga Esperanto-kurso gvidata de J.P. Vilhelm (Francio), ktp.

Kotizoj: Programkostoj (unu sekcio dum unu semajno): 900,-bf; Restadkostoj (modifeblaj) (semajne): ĉ. 2 000,-bf; Perfektiga Esperanto-kurso (semajne): 400,-bf; Taga kotizo por vizitantoj (sen restado): 200,-bf.

Stipendioj: Estas disponeblaj kelkaj stipendioj. Interesuloj sin turnu al la SUK-adreso.

Faldfolioj: Krom faldfolio kun ĝeneralaj informoj pri la sesio kaj aliĝilo, disponeblas dua faldfolio en kiu ĉiu kurso estas detale priskribita. Petu la du faldfoliojn ĉe la SUK-adreso.